

SEPTEMBRO 2004

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2004:4-5

Literatura numero
paĝoj 9–23

Foto: Kaisa Hansen



Esperanto-Centro

Vårt ansikte utåt

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Septembro 2004 • 92-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm**Frågor om prenumeration o. dyl.:**Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00**E-post:** nordenstorm@glocalnet.net**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm**Utformning:** Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm**Tryck:** Al-fab-eto, Skövde**Prenumeration 2004:** 200 kr.Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.**ESPERANTOFÖRBUNDET****Adress:** Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00**E-post:** sef@esperanto.se**Nätsida:** www.esperanto.se**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet**Medlemsavgift 2004:**Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).**ESPERANTOFÖRLAGET****Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm**Telefon:** 08 - 34 08 00**Postgiro:** 578-5**Nätsida:** www.esperanto.se/eldona**Telefontid:** Samma som Esperanto-Centro Stockholm. Skriftliga beställningar expedieras under hela året.**Manus till *La Espero***

sänds till Leif Nordenstorm

Järnvägsgränd 11

961 76 Boden

tel. 0921-123 54

e-post: nordenstorm@glocalnet.netNär kommer *La Espero* 2004:

	<i>Stoppdatum</i>	<i>Utkommer senast</i>
Nr 6	15 oktober	15 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

Aira Kankkunen

ankaŭ diagnozistikon de aŭdodifektoj ĉe infanoj, poste en Svedio, en Gotenburgo, kie mia ĉeftasko estis diagnozistiko kaj reserĉado. En Gotenburgo mi ankaŭ doktoriĝis kaj verkis mian doktoran disertacion (Pre-school children with impaired hearing in Göteborg 1964/1980, *Acta Oto-Laryngologica, Supp. 391*).

Ĉu vi havas familion?

Ne. Mi estas tute sola.

De kiam vi interesigas pri Esperanto?

En la jaro 1988. Tiam mi vidis la plej unuajn esperantajn vortojn en mia unua esperanta vortaro "Suomi Esperanto Suomi". Nuntempe mi havas multajn vortarojn diverslingvaj. Plejparte mi lernis/-os la lingvon hejme.

Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?

Mi havis esperantogrupon unu foje / semajne ĉirkaŭ 15 jarojn. Unue ĝi estis kurso, sed poste literaturgrupo. Nuntempe tiu grupo renkontiĝas unufoje/ monate. Krome mi havas novan grupon, finnajn nevidantojn. Tiu grupo donas sufiĉe multe da laboro, ĉar plejparte mi mem devas fari instrumaterialon.

Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?

Dum miaj laborjaroj, mi ne havis multe da tempo por hobiaj. Poste mi iom verkis kaj kontaktis kun aliaj verkantoj ĉefe finnaj en Gotenburgo sed ankaŭ en Finnlando. Mi skribis/-as ankaŭ finnalingve. Krome mi havas kontakton kun finna eklezio en Gotenburgo. Kaj mia komputilo pliriĉigas mian vivon.

Skribe intervjuis: Leif Nordenstorm

Kie vi naskiĝis?

Mi naskiĝis en Finnlando en la vilaĝo Vuolijoki, kiu situas meze de Finnlando t.e. ĉirkaŭ 600 kilometrojn de Helsinki kaj same 600 kilometrojn de Ivalo. Mia patro estis instruisto tie. Poste mia familio enloĝiĝis en Kajaa-ni.

Kie vi loĝas?

Mi loĝas en Gotenburgo jam preskaŭ 40 jarojn.

Pri kio vi laboras?

Mi pensiĝis antaŭ kelkaj jaroj, do nun mi estas emeritino. Mia bazedukado estas flegistino. Dum mia specialistiĝo pri socialprizorgado mi konatiĝis kun la mondo de surduloj, kaj pro tio tiu laboro iĝis mia vivlaboro. Mi laboris inter surdaj kaj surdetaj plenaĝuloj kaj infanoj, unue en Finnlando ĉefe en infanaŭdiologio enhavante instruadon kaj iom poste

Vortoj de la redaktoro

Jen ankoraŭ nova numero de *La Espero*. Multaj esperantistoj respondis al mia demando sendi beletran materialon por la numero. Mi ĝojas, ke multaj esperantistoj verkas kaj tradukas en Esperanto.

Vere interesa estas ke Esperanto bone vivas. En tiu ĉi *La Espero* ni povas legi ekzemple pri multaj partoprenantoj en UK en Ĉinio, kie estis multaj ĉinaj komencantoj. Ni povas legi pri multaj partoprenantoj en la kurso en Esperanto-Domo kaj ankaŭ en Oskarshamn. Kaj ni povas legi, ke fondiĝis lernejo en Togolando, en kiu Esperanto estos grava fako kaj kie ĉiuj instruistoj estos esperantistoj.

Esperanto sendube estas interesa fenomeno! Vivu ĝi!

La redaktoro

Multaj ĉinaj komencantoj en Pekino

VIRINA PLIMULTO EN LA NOVA ESTRARO DE UEA

La nove elektita Komitato de UEA en sia unua, tuttaga kunsido dum al UK en Pekino, sabaton la 24-an de julio elektis ankaŭ novan estraron por la venontaj tri jaroj. Prezidos la organizon Renato Corsetti, Italio. Vicprezidanto estos Claude Nourmont, Francio, dum Ulla Luin, Svedio, estos la ĝenerala sekretario. En la estraro estos krome Ans Bakker-ten Hagen, Nederlando, Maritza Gutierrez, Kubo, Amri Wandel, Israelo, kaj Yu Tao, Ĉinio.

(laŭ NUN)

1794 kongresanoj el 49 landoj aliĝis sufiĉe frue por ankoraŭ eniri la adresaron de la Kongresa Libro de la 89-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino (24-31 julio). La nombro ankoraŭ plialtiĝis per surlokaj aliĝoj [fina cifero pli ol 2000].

Pli ol duono de la fruaj aliĝintoj, 931, venas el la gastiganta lando. Aliĝintaj landoj kun multaj aliĝintoj estas Japanio (177), Francio (81), Germanio (71), Korea Resp. (51), Italio (46), Litovio (36), Rusio (37), Nederlando (30), Usono (27), Kroatio (24), Svedio (23), Vjetnamio (22), Brazilo (21), Britio (19), Aŭstralio kaj Svislando (po 15). Laŭdire multaj el la ĉinoj en la kongreso estis komencantoj.

Laŭ la retejo www.liberafolio.com ĉinaj amaskomunikiloj bone atentis la solenan inaŭguron de la Pekina universala kongreso, kiu okazis dimaĉe matene. Amplekse raportis inter alie Ĉina Centra Televido ankaŭ en sia tutmonde spektebla anglalingva elsendo. "Energia disvolvo de Esperanto estas necesa por realigi lingvan egalecon", diris reprezentanto de la ĉina parlamento en la solena inaŭguro.

La plej amuza momento de la solena inaŭguro verŝajne okazis, kiam la reelektita prezidanto de UEA, Renato Corsetti, ŝerce aludis pri preskaŭ okazinta diplomacia konflikto inter UEA kaj Tutmonda Esperantista Junulara Organizo TEJO. Laŭ Corsetti, la rilatoj inter UEA kaj TEJO tre streĉiĝis, ĉar UEA insistis, ke la prezidanto de, Bertrand Hugon, havu kravatton dum li sidis sur la podio dum la inaŭguro.

Cetere la ĉi-jara inaŭguro estis almenaŭ same solena kaj longa kiel kutime, sed ĝi ja sukcesis altiri la atenton de la amaskomunikiloj. La parolado de Renato Corsetti estis filmita el diversaj anguloj, kaj jam dimanĉe matene aperis ampleksaj raportoj pri la inaŭguro en ĉina Interreta Informa Centro.

Ankaŭ Ĉina Centra Televido raportis pri la inaŭguro de la Universala Kongreso en siaj novajelsendoj. En tutmonde spektebla anglalingva kanalo de la ĉina televido CCTV9 la novaĵlegisto salutis la spektantojn dirante "Bonan tagon". Krom kelkaj bildoj el la inaŭguro, la kanalo elsendis ankaŭ plurminutan intervjuon kun la antaŭa vicprezidanto de UEA, Humphrey Tonkin. CCTV9 estas dissendata per ses satelitoj kaj ĝiaj programoj estas spekteblaj sur 98% el la

monda surfaco.

En la anglalingva intervjuo al CCTV9 Tonkin konsentis, ke Ĉinio en la nuna mondo ja bezonas la anglan lingvon por siaj internaciaj rilatoj, sed li opiniis, ke en la ĉinaj lernejoj oni povus krom la angla instrui ankaŭ Esperanton. Kiam la intervjuanto miris, ke oni ĉiujare aranĝas kongreson de esperantistoj, kvankam malmultaj homoj parolas la lingvon, Tonkin respondis, ke la esperantistoj ja ne estas tiom malmultaj, kaj ke ĉiun tagon ie en la mondo okazas ia esperantista renkontiĝo.

La malfermo de la Universala Kongreso jam dimanĉe matene estis la ĉefa novaĵo en la ĉina, angla, araba, franca, germana, hispana, japana kaj rusa versioj de Ĉina Interreta Informa Centro.

Aparte grandan atenton en la Ĉina registara retejo ricevis la salutaj vortoj de Wu Bangguo, la prezidanto de la ĉina popola kongreso (parlamento) kaj la alta protektanto de la Universala Kongreso. Wu Bangguo mem ne ĉeestis la inaŭguron, sed en sia salutmesaĝo li akcentis, ke speciale dum la lastaj 20 jaroj la Esperanto-movado en Ĉinio prosperas pro la politikaj reformoj en la lando kaj la malfermiĝo de Ĉinio al la ekstera mondo. Li esperis, ke la nuna kongreso fortigos la amikecon inter popoloj.

Kiel reprezentanto de la Ĉinaj aŭtoritatoj ĉeestis la inaŭguron Xu Jialu, vicprezidanto de la Ĉina popola kongreso kaj konata lingvisto. En sia ĉinlingva parolado, kiu estis sinsekve interpretata, Xu Jialu tuŝis la kongresan temon Lingva egaleco en internaciaj rilatoj. Laŭ li la temo estas grava, kaj la kontribuo de la Esperanto-movado por paco kaj lingva egaleco aparte laŭdinda.

Energia disvolvo de Esperanto estas necesa por realigi lingvan egalecon en la nova jarcento, diris Xu Jialu, kaj aldonis, ke la Ĉina registaro ĉiam subtenas la Esperanto-movadon.

Xu Jialu ankaŭ memorigis pri la Pekina Universala Kongreso en 1986.

"En la pasintaj 18 jaroj la ĉina socio, ekonomio kaj kulturo rapide evoluis. Ankaŭ la ĉina Esperanto-movado senĉese progresis. Tion vi povas sperti dum la kongresaj tagoj. Nun estas plej varme en Pekino, vi certe spertis tion. Konsideru tion kiel la varmecon de la ĉina popolo al la eksterlandaj gastoj, diris Xu Jialu.

Laŭ ĉina partoprenanto, la parolado de Xu Jialu kelkloke estis tiel emociiga ke iuj ĉeestantoj ekploris. Ankaŭ parolado de Zhang Qicheng, 91-jara ĉina esperantisto, ricevis longan aplaŭdon. Parolis ankaŭ Humphrey Tonkin, laŭ kiu la denaskaj angleparolantoj kaj anglalingvaj landoj diris ricevos des pli grandajn avantaĝojn, ju pli da ĉinaj infanoj lernos la anglan lingvon.

Humphrey Tonkin sidis sur la podio, ankoraŭ en la rolo de vicprezidanto. Sur la podio krom la ĉinaj honoraj gastoj sidis ankaŭ Michela Lipari, Ivo Osibov kaj Osmo Buller, sed ne la nov-elektitaj estraranoj.

Ĉi-jare ĉeestis kongresanoj el 51 landoj, kaj kiel kutime, reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj landoj salutis la kongreson kelkvorte. Malofta gasto estis kongresanino el Afganio, kiu same salutis la kongreson nome de la afganiaj esperantistoj.

La inaŭguron ĉeestis ankaŭ diplomaciaj reprezentantoj el dek landoj, inter tiuj tri reprezentantoj de Irano. Siajn ambasadorojn sendis al la inaŭguro Irano, Kroatio, Nepalo kaj Pollando, aliaj landoj estis reprezentitaj sur malpli alta nivelo.

Parolis Chen Haosu en fermo de 89-a UK. Li i.a. diris: "Ĉinio bezonas Esperanton. Ĝi volantas intensigi siajn amikecon kaj kunlaboron kun alilandaj popoloj por realigi eternan pacon kaj kunan disvolvigon de la tuta homaro. Ankaŭ Esperanto bezonas Ĉinion. Ĝi esperas, ke ĝia rapida disvastiĝo en Ĉinio utilos al ĝia populariĝo en la tuta mondo. La centjara historio de la Ĉina Esperanto-movado pruvis, ke Esperanto jam enradikiĝis en Ĉinio, granda antikva lando en la Oriento, kaj strikte ligiĝas kun la sorto de la Ĉina popolo."

Post la kongreso multaj kongresanoj partoprenis postkongresajn ekskursojn kaj vizitis multajn lokojn de Ĉinio.

N.d.l.r.: *La enhavo en tiu ĉi artikolo ĉefe venas de informoj en interreto, ĉefe el la jam menciita retejo www.liberafolio.org.*

La Espero tamen invitas la legantojn, kiuj vizitis UK en Pekino skribi, pri personaj impresoj el la kongreso.

Internacia Junulara Kongreso en Rusio

Ni estas tre dankemaj ĉar oni donis al ni la Märthastipendion, kiu helpis nin partopreni en nia unua Esperanto-kunveno – la Internacia Junulara Kongreso. En ĉi tiu jaro ĝi okazis apud la rusa urbo Kovrov.

Ekde tiu ĉi vintro ni studas esperanton. En Umeå, ni klopodis komenci studrondon pri Esperanto kaj kelkaj personoj montris intereson. Sed ĉe nia unua kunveno en la ĉefbiblioteko de Umeå, venis nur tri personoj (el kiuj du estis ni). Eble ĉar estis terura neĝostormo kaj estis malfacile veturi aŭtobuse. Tial ni studis Esperanton sole kaj interrete dum la printempo ĝis ĉi tiu IJK.

Ni flugis el Svedio Moskven la 6-an de julio kaj tie rekontis la gvidantinon de antaŭkongreso en Moskvo. Ŝi ekbabilis gaje, rapide, sed niaj cerboj ankoraŭ ne kutimiĝis aŭskulti Esperanton. Estis interese por ni aŭskulti denaske parolantan esperantiston.

La tuta vojaĝo multe impresis al ni. Neniam estis tede, nur kelkfoje lacige, ĉar kelkfoje la gramatiko de Esperanto estis malfacila por novulo.

Vortaro diligente uzigi. Malrapide, el konscio nia, ni ekuzis novajn prepoziciojn. Kaj ni lernis, ke preskaŭ ĉio povas eksplikiĝi eĉ per malmulte da diversaj vortoj.

La antaŭkongreso

La antaŭkongreso estis plenigita per aktivecoj. Afablaj esperantoparolantaj gvidantoj gvidis nin tien kaj alin tra la granda Moskvo. Ni loĝis en bona hotelo, proksime al la VDNĤ-parko kun la grandega rakedomonumento. En la hotelo laboris afablaj laborantoj, kiuj noktomeze malfermis la pordon por ke festemuloj povu eniri. La litotukoj kaj la duŝejo estis puraj kaj la manĝoj estis sanaj.

La kongreso mem

La 10-an de julio ni iris aŭtobuse el Moskvo al la IJK-ejo, en la kamparo apud la urbo Kovrov kaj la rivero Kljazma. Tie estis 350 geesperantistoj el 30 malsamaj landoj. La temo de la kongreso estis "June kaj kune" (aŭ ĉu estis "June kaj kule"?). Kiam la matenvigululoj vekigis por fari matengimnastikon, la festemuloj ankoraŭ ne ĉesis.

Aktivecoj kaj elektoeblecoj estis intermateno kaj nokto. Estis multaj svedoj. Ni kaj la germanoj havis la plej multajn partoprenantojn (krom Rusio memkompreneble, kiu havis proksimume 150).

La aranĝo estis tipe ruse afabla. Dum la inaŭguro oni donis al ni glucan paston, faritan de poligono (*bovete*) kaj viandon. Al ĉi tio estis aldona pano kaj biereto (*kvass, svagdricka*). Ĉio estis disdonita el kunportebla fumita militkuirilo.

La rusa manĝo estas laŭ niaj preferoj kaj facile eniĝis en la stomakon. Pli malbone por la vegetaranoj, ĉar la kuiristoj ne komprenis, ke fiŝo kaj ovo ne estas vegetara manĝo. La aktivecoj multe temis pri teatro, la oriento, rusa kulturo, diversaj ludoj kaj memkompreneble pri la esperanta lingvo mem. Ĉiu vespero finiĝis per la danco "la bamba" kaj saŭno por tiuj kiuj volis. Ĵomart kaj Nataŝa multfoje muzikis kaj varmigi la korojn per siaj mielĉaj voĉoj. Ankaŭ la Perdita Generacio el Danio kaj Svedio faris bonegan prezentadon.

La parolanta lingvo pli kaj pli pliboniĝis. Ne ĉar ni devis lerni aŭ partopreni kursojn, nek ĉar ni multe studis esperantan gramatikon aŭ vortojn. Simple ĉar oni "devis" paroli kun la multaj afablaj personoj. Kaj ĉar oni gajnis spertojn. Ni surpriziĝis, ĉar Esperanto facile uziĝis por malfacila diskutotemo, ekzemple pri la politika situacio en Transdnestrion kun du moldavaninoj, pri tio, kial oni ne devus privatigi la hospitaloj, pri la armeoj kaj la vizoj kun amerikano, kaj pri la esperanta movado kun multaj homoj.

Kiam ni iris hejmen, ni loĝis du noktojn en Moskva esperantocentro. Sed ne sole. Malsataj kaj lacaj 16 esperantistoj atingis la centron, post tuttaga busveturo el Kovrov. La centro estas du ĉambroj kaj kuirejo. La tri esperantistoj kiuj jam tie loĝis nin varme bonvenigis per bonaj manĝaĵoj kiuj kontentigis nin.

Martin Wiss kaj Joakim Lilljegen

Tack från Svenska Esperantoförbundet

Svenska Esperantoförbundet framför härmed sitt varma för alla generösa gåvor. Gåvor är alltid välkomna till SEFs postgiro 2012-3.

Ett särskilt tack riktar vi till alla i RONDO LANGLET, som därmed ger SEF en stabil månatlig inkomst. Medlemmar i Rondo Langlet, är de som via autogiro skänker 100 kr eller mer per månad eller mer än 1200 kr i början av varje år.

Rondo Langlet hade i juli 2004 18 bidragsgivare, varav 10 anmält sig under 2004

Ni är alla välkomna att ansluta er till RONDO LANGLET. Anmäl dig till Kaisa Hansen, tel: 08-590 88 210 eller e-post kaisa@esperanto.se så får du en blankett överskickad.

Årsmöte Esperanto-Gården ek. för.

Ekonomiska Föreningen Esperanto-Gården inbjuder alla andelsägare till årsmöte lördagen, den 9 oktober 2004 kl. 14.00 i Esperantogården i Lesjöfors.

Förutom sedvanliga årsmötesförhandlingar behöver vi diskutera ett antal andra frågor och därför är det önskvärt att så många som möjligt deltar.

Fredag kväll samt lördag och söndag förmiddag ska vi försöka förgylla tillvaron med några trevliga programpunkter.

V.g. anmäl er till E-gården direkt tel 0590-30909

Simpozio memore al Harold Brown

La 12an de majo kvardeko el la amikaro de Harold Brown kolektiĝis en la paroĥa domo de Högsby. Kiel sciata, Harold forpasis ĉi-marte. Diversforme li priskribis sian interesan kaj vario-plenan vivon. Krom pentristo, grafikisto, filozofo kaj granda humanisto li estis elstara esperantisto. En esperanto li verkis i.a. la teatraĵaron "Eduko danĝera", "Leteroj el Svedio", kaj kune kun Kerstin Rohdin li tradukis "Emilo en Smolando". Kune ili verkis "Svedio du bildoj".

En tiu tago la pola aktoro Jerzy Fornal, longjara amiko kaj kunlaboranto de Harold, prezentis lian unuaktaĵon "Vagabondo". Kerstin transdonis bonegan de ŝi tradukitan version al neesperantistoj. La prezentado estis kortuŝa kaj la kulmino de bela tago por honori la memoron de Harold.

Sekvis por kelkaj el ni renkontiĝo en La Flava Domo ĉe rivero Em. Reventinte hejmem mi relegis kion Harold skribis pri tiu mirinde bela pejzaĝo loĝloko en "Svedio du bildoj". Ĉu vi ĝin legis? Se ne, havigu al vi ekzempleron!

Ulla Saether, Lund

SEF gratulas



UEA ricevis en Pekino novan ĝeneralan sekretarion. Ŝi nomiĝas **Ulla Luin**, kiu dum tre multaj jaroj estis membro de la estraro de SEF, plej ofte kiel ĝia sekretario.

Ulla estas la kvara membro de SEF, post la dua mondmilito, kiu ricevis gvidan taskon en la estraro de UEA. Ernfrid Malmgren, iama prezidanto de SEF en 1948 elektiĝis prezidanto de UEA. En 1980 Roland Lindblom fariĝis estrarano kun respondecado pri kongresoj; en 1998 Kalte Kniivilä ekrespondecis en la estraro pri informado.

SEF gratulas al Ulla Luin — kaj al UEA!

Sveda Esperanto-Instituto

invitas al
seminario en la popola altlernejo de Oskarshamn
25-26 septembro 2004

Programo:

Sabate 25 septembro:

- 10 — 11.30 La fratoj Dalmose pri la kosmologio de Martinus
- 12 — 13 Lunĉo
- 13 — 14.30 Jevgenij Gaus pri Litovio
- 15 — 16.30 Jarkunveno de SEI
- 18 — 19 Vespermanĝo
- 19 — Distraĵo — la fratoj Dalmose kaj Martin Strid.

Dimanĉe 26 septembro

- 9 — 10 Jevgenij Gaus: Pli pri Litovio
- 10.30 — 11.30 Martin Strid pri "tonsilabo" kaj aliaj muzikaĵoj
- 12 — 13 Lunĉo
- 13 — Libere disponebla tempo kaj "Ĝis revido"

Konferenckotizo: A 325 SEK

Restado: Vendredo — Sabato — Dimanĉo (24 — 25 — 26 sept)
La prezo inkluzivas manĝojn

- B1 1 100 SEK unulita ĉambro
- B2 1 000 SEK dulita ĉambro

Sabato — Dimanĉo (25 — 26 sept)

- C1 800 SEK unulita ĉambro
- C2 700 SEK dulita ĉambro

Kunportu lit- kaj mantukojn, alie vi devas pagi aldone (75 SEK)

ALIĜU TUJ!!!

Pagu al pĝ 5 15 11 — 4, Svenska Esperantoinstitutet.
Notu vian mendojn sur la talono, ekz. konferenckotizo (A) + restadoj (B, C..1-2) kaj indiku ĉu vi deziras vegetaran aŭ alian specialan manĝon.
Pagu kaj menu en bona tempo antaŭ la seminario. Tio faciligas la administradon. Dankon!

Ĉiuj estu kore bonvenaj!

Lars Forsman Bertil Andreasson Bo Sandelin Inga Johansson
0586-548 11 0415-501 52 031-91 85 54 031-15 57 23

Siv Burell
0302-411 49

Afrika lernejo instruos Esperanton

Post plurjara laboro nun realiĝas la revo de Gbeglo Koffi: en septembro malfermos siajn pordojn nova lernejo en Togolando, kie la infanoj lernos ankaŭ Esperanton, kaj ĉiuj instruistoj estos esperantistoj. La unuaj donacintoj al la projekto estis esperantistoj. Gbeglo Koffi, kiu estis estrarano de UEA ĝis la elektoj en Pekino, rakontas pri la evoluo de la projekto en ampleksa artikolo.

Mi estas instruisto pri matematiko en mezgrada lernejo jam pli ol dudek jarojn. En 1997 mi ekdeĵoris en nove kreita lernejo kun la nomo *CEG Anfame* (CEG estas kolegio de ĝenerala instruado kaj Anfame, nomo de kvartalo de la urbo Lome). Finlerninte dum ses jaroj en elementa lernejo, geknaboj kun aĝoj inter 9 kaj 16 jaroj lernas dum kvar jaroj en CEG antaŭ ol iri al liceo, kie ili pasigos tri jarojn por atingi altlernejon aŭ universitaton). En septembro 2007 la ŝtato Togolanda decidis la starigon de la lernejo. Direktoro estis nomumita, kaj ankaŭ la kvartalo de la lernejo elektita. La sola nekonata afero tiam estis la loko, kie estu la lernejo. Al la direktoro oni diris: "Iru kaj serĉu mem la lokon". La direktoro trovis la kvartalon, sed ne niu scias pri la loko, ĉar tute ne ekzistis la lernejo, eĉ ne tereno, kie ĝi estu. Ĉar gelernantoj jam estis de la inspektoro enskribitaj sur la listo de la lernejo, oni devis ekinstrui ilin. Kiel tio eblis? Io tamen komenciĝis.

La kompatinda direktoro travagis la kvartalon, sed trovis nenion. Finfine lernejo en apuda kvartalo ofertis unu klasĉambron, kaj la kurso devis okazi en la posttagmezo. Estis tiam nur tri horoj da kurso ĉiutage kontraŭ almenaŭ 5 laŭ la instruprogramoj. Kio pli ĝenadis tiam, tio estas, ke en la tagoj de ekzamenoj aŭ taskoj de la gastiganta lernejo, la sola klaso ofertita al CEG Anfame estas retirita. Jen pliaj kurshoroj devis fali. Tio daŭris dum la tuta lerneja jaro 1997-1998. Ĉiuj esperis ke la nova lerneja jaro alportos pli bonan situacion.

En septembro 1998 plu ne estis trovebla la loko de la nova lernejo, kvankam ĝi jam havis pli ol 200 gelernantojn. Guste tiam la direktoro aŭdis pri konstruo de novaj klasĉambroj en elementa lernejo de apuda kvartalo. La direktorino de tiu ĉi lernejo estis malkonstruonta la pajlan kaj hurdan konstruaĵon, kiun anstataŭis la nova. La direktoro de la kolegio tuj kuris al ĝi, ke la hurdaĵojn uzu la gelernantoj de la senloka CEG Anfame. Tiel la

nove kreita kolegio povis havi siajn unuajn klasĉambroj kaj funkcii plentempe. Estis tiam tri klasĉambroj, kaj en ĉiu estis pli ol 80 gelernantoj.

La naturo estas kompatema, kio ebligis al la gelernantoj kaj geinstruistoj ne sufokiĝi pro la varmego, kiun generas la tegmento ferlada preskaŭ tuŝanta iliajn kapojn. Kiam pluvis, la klasĉambroj fariĝis rezervujo da akvo. La gelernantoj tute ne malprave skribis sur tabulo "nia klasĉambro transformiĝis en riveron, la benkoj en pirogojn, la geinstruistoj en remistojn, kaj la gelernantoj en fiŝojn". Ĉu lernado en tia situacio povas esti efika?

Mi multe pensadis: "Ĉu la infanoj elektis mem veni en la ĉondon? Kial ili havu tiun ĉi sorton? Necesas helpi ilin". Tiuj pensoj kirliĝis en mia kapo, sed mi tute ne povis ion fari, ĉar mia salajro, jam lilipta kaj ege nesufiĉa por prizorgi mian familion, tute ne povis ebligi al mi ion fari por la kompatindaj infanoj. Mi staris senforta antaŭ la situacio, kiu fariĝis pli grava por multaj gelernantoj, kiuj, krome, tute ne trovas ion por manĝi en la lernejo, ĉar la gepatroj ne havas monon. Plie, ili devas ankaŭ pagi lernokotizon ĉiujaran, 3 000 F por la knabinoj kaj 4 000 F por la knaboj (ĉirkaŭ 6 eŭroj), kiun multaj gepatroj tute ne povas doni. Ĉu tamen ne paginte, la gelernantoj vizitis la lernejon?

La direktoro estas ege kompatema kaj eĉ ne devigis la gelernantojn pagi. Sed kiam li estis anstataŭita de direktorino, tiu ĉi ne estis pardonema. Al lernanto, kiu ne pagis, tiu la direktorino malpermesis la eniron en la klasĉambron por sekvi kurson aŭ ekzameniĝi. Pli kortuŝe estas, ke la kotizojn, kiujn ŝi kolektis, ŝi pli uzis por propraj aferoj lasante preskaŭ nenion por la lernejo. Multaj gelernantoj ne povis daŭrigi la lernadon en la kolegio, kvankam ili ja havas la emon. Vere necesas ion fari por la kompatinduloj. Mi devis plupensi: "Ĉu Esperanto ne povos ion fari por ili?"

Mia infanaĝo okazis en vilaĝo, kie mi vizitis katolikan lernejon. Tiaj lernejoj abundas tra la lando. Ekzistas aliaj lernejoj, kiujn starigis la religuloj por helpi al la infanoj instruiĝi, kaj samtempe doni vivtenon al la homoj tie laborantaj. Plia afero en tio estas, ke la gelernantoj kaj instruistoj estas devigataj praktiki la religion. Mi tiel fariĝis katoliko, kaj nun mi povas nenion bedaŭri pri tio. Mi multe lernis de la katolikoj tiamaj, kaj tiuj lecionoj poste igis min esplori pri pliaj religioj,

kaj ankaŭ Esperanto donis pliajn lecionojn al mi. Alia grava afero, kiun mi memoru estas la analfabeteco de la vilaĝanoj kaj de la plejparto de Togolandanoj. Tiaj tute ne komprenas la utilecon de lernejoj. Jen do iuj rifuzas, ke iliaj gefiloj iru al lernejoj, dum aliaj, kiuj tion permesis, senkonscie malhelpas al siaj gefiloj progresi.

Kiam venas la pluvsezono aŭ periodo de abundo de fiŝoj en la lago, la gepatroj devigis la gelernantojn forlasi la lernejon por labori sur kampo aŭ lago dum pluraj monatoj. Nur post tio ili revenas al la lernejo. Tiam multaj lecionoj estis faritaj kaj jen ili povis nenion kompreni. Mi mem spertis tiajn aferojn. Mi devis lerni malsata dum longaj jaroj, ĉar mi elektis iri al lernejo, anstataŭ forlasi ĝin profite al kampo aŭ lago. Mi nun vidas samgeneracianojn, kiuj ne povis spiti tiam la gepatrojn. Multaj estas analfabetoj kaj vivas en nescio pri multaj aferoj.

Tiu ĉi eta instruiteco, kiun mi posedas ebligis al mi ankaŭ malkovri Esperanton, kaj mi nun spertas la utilon de la internacia lingvo. La personeco de Zamenhof ĉiam mirigas min. Mi estas Esperantisto kaj trovas, ke Esperantisteco gravas por ĉiuj. Ĉar religioj transformas homojn, ankaŭ Esperanto tion faru kaj faras. Esperanton ja uzas afrikanoj, sed bedaŭrinde preskaŭ ĉiuj Esperantistoj havas malfacilan aliron al vivteno kaj tio tute malhelpas la glatan disvastigon de la lingvo sur la kontinento. Sonis en mio: "Se Esperantistoj imitus la religulojn, ĉu la infanoj ne facile instruiĝus, junuloj ne trovus vivtenon, kaj aliajn homojn atingus Esperanto, ktp?"

Mi decidis paroli pri tio al Hans Bakker, la tiama komisiito de UEA pri la afrika agado. Hans estas vere tre bonkora kaj sentema. Li trovis la ideon bona kaj tuj reagis, ke ni iam revenu al ĝi: "Ni havu lernejon por la infanoj. La lernejo uzu la oficialajn instruprogramojn Togolandajn, kaj krome ankaŭ Esperanto estu instruata kiel lingvo kaj vivokcepto laŭ la ideoj de Zamenhof. En la lernejo instruu nur Esperantistoj, kiuj tiel havante vivtenon, povos dediĉi sin al Esperanto". Tiel komenciĝis la tuta projekto "Esperanto-lernejo". La paso de la tempo la afero maturiĝis. Krom Hans, ankaŭ aliaj homoj enplektiĝis en la aferon. Hans organizis monkollektan kampanjon, kaj la unuaj donacintoj estis Esperantistoj. En 2001 ni aĉetis grundon. Hans plulaboris, ankaŭ aliaj. Ne mankis helpo de Re-

nato Corsetti kaj Nelly Holevitch. Tiu ĉi lasta havas apartan mencion en la afero, ĉar ĝiaj multflankaj kuraĝigoj, konsiloj, proponoj, klopodoj, ktp. ege efikis.

Fondaĵo estas starigita en Nederlando. Prezidate de Hans, la fondaĵo *Een school in Togo* turniĝis al bonvolemaj homoj kaj asocioj. Rezultas io konkreta el tiuj klopodoj: la lernejo estas preskaŭ konstruita, kaj en septembro 2004 ĝi malfermos siajn pordojn al la Togolandaj infanoj.

Nun bela konstruaĵo estas disponigata al kompatindaj infanoj, sed ĉu tio sufiĉas? Certe trovado de benkoj kaj ankaŭ libroj ne estus granda problemo ĉar temas pri unufoja investo. La lernejo ne estas ŝtata, do la ŝtato ne povas ĝin subvencii.

En privataj lernejoj la instruado iras pli glate, sed tamen problemoj ne mankas en multaj: pro la monavido de multaj fondintoj, kiuj petas altan lernokotizon sed ne pagas salajrojn al la geinstruistoj, la instruado kolapsas. Vere necesas speciala lernejo por la kompatindaj infanoj. Jen do la projekto "Esperanto-lernejo" akuŝas ion tian: la Instituto Zamenhof (IZO).

La instituto Zamenhof estos tute alia kategorio de lernejo. Okazos la instruado laŭ la oficialaj programoj en Togolando. Aldone, estos kromaj objektoj: Esperanto, pacedukado, regado de konfliktoj, informadiko, lecionoj pri muziko kaj kuirado kaj tiel plu. La instruado en ĝi okazu en tute serena etoso laŭ kriterioj de amo, justeco ktp. Jen kelkaj:

- instrui en spirito de toleremo kaj frateco
- instrui en spirito de scivolo pri la

mondo, la homo kaj la naturo

- instrui kun ĉiama atento al sano, higieno kaj ordo
- instrui pedagogie: t.e. ne per punado sed per kuraĝigado
- instrui kunlaborante kun la plej maturaj lernantoj
- instrui uzante interreton por tutmondaj kontaktoj, i.a. per Esperanto
- ne nur instrui sed ankaŭ labori por ke la lernejo enspezu ekonomie
- krei kun la lernantoj kaj la kolegoj komunumon por la plu-ekzistado de la lernejo
- serĉi bonajn rilatojn de gepatroj, por ke tiuj interesiĝu pri la lerneja vivo kaj helpu ĝin disponigi lecionojn ne por la diplomo sed por la vivo.

Kvankam privata, la lernejo tamen ne estos komerc-cela, sed sociala. Per la kontribuo de la gelernantoj (maksimume 25 000 F (38 eŭroj) por ĉiu lernanto en la jaro) oni funkciigos la lernejon, pagos salajrojn al la instruistoj, kaj se eblas, doni manĝaĵon bonkvalitan kaj ankaŭ medikamentojn al la gelernantoj. Krome, la instituto klopodos alimaniere enspezi por kovri parton de siaj bezonoj. Funkcias en la lernejo retkafejo, kia tute ne ekzistas en la kvartalo.

La plejparto de tiuj ĉi estas malriĉaj, kaj tial ĝi tute ne povas ebligi al siaj gefiloj viziti lernejon kaj al si mem (plu)lerni; la instituto Zamenhof do ŝatus helpi tiujn per kontribuo de malavaraĵoj eksterafrikanoj Esperantistoj aŭ ne-Esperantistoj. Ĉiuj povas helpi siamaniere: helpi mem aŭ helpi-

gi. Sistemo "adopta" estas ebla: eksterafrikano povas pagi la lernokotizon de unu aŭ pluraj lernantoj aŭ donaci monon al la instituto. Oni povas organizi ĉirkaŭ si grupon de subtenantoj de la instituto: la precipa celo estas klopodi, ke la lernado okazu glate kaj ke ankaŭ gefiloj de senhavaj gepatroj edukigu; ili havu lernilojn, trou manĝon, lernu en vere funkcianta lernejo, kies gelernantoj povos tute libere kaj senprobleme rilati kun siaj kolegoj tra la tuta mondo.

Tiaj grupoj jam formiĝas en Francio kaj Belgio sub la instigo de Esperantistoj, kiuj tiel invitis ankaŭ ne-Esperantistojn. La francino Evelyne de "sunkompanio" jam varbis pli ol dudek kvin subtenantojn kies unuaj donacoj estas 2600 eŭroj, kaj la belgino Agnes Geelen kolektas monon, lernilojn kaj vestaĵojn por la lernejanoj. Tio ĉi estas farebla de ĉiuj Esperantistoj de aliaj landoj. Alikategoria helpo estas ebla: profesiaj instruistoj povos instrui senpage en la lernejo dum unu aŭ pluraj jaroj; tiel la mono uzota por dungi instruiston estos rezervita por aliaj aferoj. Kontribuado en la sukcesa funkciado de la lernejo havas multajn branĉojn. Ĉiu povas elpensi ion por helpi la kompatindajn infanojn, ankaŭ de kiuj dependas la estonta farto de la homaro.

Tiel ĉi finiĝas la informoj pri la nova lernejo en Togolando en tiu ĉi numero de La Espero, sed ni daŭre raportos pri la lernejo kaj pri eblecoj kunlabori kun ĝi.

Kunlaboro ĉe Balta maro

La klubeto de Oskarshamn havas daŭran kunlaboron kun ĉebaltmaraj najbarlandoj, La prezidantino de la klubo Birgitta Ekvall vizitis Tallinn, Riga kaj Gdynia kun grupoj de La Popolaltnernejo de Oskarshamn. Ŝiaj grupoj en ĉiuj vizititaj lokoj renkontiĝis kun la lokaj esperantogrupoj, kvankam nur Birgitta kaj unu — du aliaj en la svedaj grupoj estis esperantistoj. La svedaj grupoj interesiĝis pri esperanto kaj eble nia klubo povos pligrandiĝi denove.

Kelkaj anoj de la esperantogrupoj de Gdynia reciproke vizitis nin, ili verkis artikolon pri tiu vizito.

Tiun artikolon ni ankaŭ uzis kiel legomaterialon dum nia somera kurso en Oskarshamn. La kursoj vizitis kelkajn el la priskribitaj lokoj kaj mem verkis tekstojn pri diversaj vidindaĵoj de Oskarshamn.

Kerstin Rohdin

La artikolo de Gdynia-anoj

Vojaĝo al Svedio laŭ la itinero Gdynia-Karlskrona-Högsby okazis je invito de nia kara amikino Kerstin Rohdin — reciproka vizito, ĉar Kerstin vizitis nin en Gdynia en 2002; ankaŭ 13-persona grupo de studentoj el Oskarshamn Folkhögskola kun sia instruistino Birgitta Ekvall venis al Gdynia kaj vizitis la Triurbon Gdynia, Gdansk, Sopot kaj la kastelon en Malbork en majo 2001. La vizito finiĝis per balo.

Nia vizito en Högsby estis semajno plena da ĝojo kaj vere esperanto semajno. Sur la perono de la stacidomo bonvenigis ni ĉiuj kunvenitaj geesperantistoj. En la programo de nia restado estis multaj ekkursoj; la urbo Högsby, la ĉirkaŭaĵo kaj la regiono.

La domo de Kerstin situas apud la

rivero Em. De la balkono etendiĝas pitoreska vidaĵo sur la meandro de la rivero fluanta el inter densa arbaro. Unufoje okazis tie granda regalo ĝis malfrua vespero, t.n. festo de kankroj.

En la unua tago ni ekskursis per du aŭtomobiloj al prahistoriaj tombaj montetoj Vallåkra troviĝantaj proksime en verdaĵo de odorantaj herboj kaj floroj. Ni veturis en vilaĝon regionon — admiris originalan vilaĝon en malnova stilo, vicojn de domoj nedisigitaj. Ni rigardis la riveron Em de alia flanko kaj de diversaj punktoj, ekzemple de la pondo da elektrofarejon Blankian.

Ni vizitis la lokojn de estintaj militistaj ekzercoj, la domoj Trossbod por militistaj materialoj. Kerstin rakontis pri zorgemo de la reĝo prii militistoj.

Las duan tagon ni estis invititaj de Birgitta al ŝia somera dometo apud Oskarshamn en Bråbo. Ege ĉarma, ligna domo el pli malnova epoko, ĉirkaŭita per ĝardeno kun herbejo, floroj kaj fruktaroj estis kiel el fabe-

(daŭrigo sur p. 12)

En Oskarshamn

7-11 junio okazis somerkurso en la popola altlernejo de Oskarshamn. Lars Forsman kaj Kerstin Rohdin estis geinstruistoj. En la grupo estis ankaŭ lernantino de la sveda popola altlernejo en Haapsalu, en Estonio.

Ni havis interesajn lecionojn sed ankaŭ du ekskursojn, unu al belega kamparo de vilaĝo Saxtorp kaj alia al Allgunnen en montara regiono. Estis tre agrable kanti belajn kantojn en Esperanto kun lerta, belega akompano de gitaro, ludita de unu de la lernantoj.

La lastan vesperon kune ni ĉeestis bonegan festkoncerton en la Cecilia-kapelo en la lernejo kaj la muzikistoj estis de la edukadokurso por kantoroj kaj orgenistoj de Sveda eklezio.

Poste ni havis agrablan ĝardenfeston en Allgunnen kun bongusta manĝaĵo de la popola altlernejo.

Mi esperas ke ni havus eblecon aranĝi esperantokurson ankaŭ some-re 2005!

Birgitta Ekvall



Partoprenantoj de la kurso en Oskarshamn. Foto: Birgitta Ekvall.

...mer om samma kurs

Kursen var uppdelad i en kurs för nybörjare under ledning av Lars Forsman och en kurs för konversation, som leddes av Kerstin Rohdin. Båda lärarna var erfarna och mycket bra pedagoger. För elevernas välfärd i alla avseenden svarade Birgitta Ekvall.

Yngve Sörman

Studier och fritid samordnades. Utflykter gjordes till Oskarshamns omgivning. Därefter höll eleverna i fortsättningsgruppen föredrag om något av utflyktsmålen. Efter en veckas trevliga studier hade vi lärt oss mycket och vi återkommer gärna nästa sommar.

Eleverna

En Lesjöfors

Inter la 28-a de junio kaj la 31-a de julio preskaŭ 50 personoj vizitis Esperanto-Domon en Lesjöfors. La plej multaj estis partoprenantoj de la kvar studgrupoj: porinfana, porkomentanta, porprogresanta kaj konversacia.

El taglibraj notoj aŭ rekta sinprezento estas la jenaj tekstoj de partoprenantoj el la kurso.

Dum la pasinta semajno ni partoprenis la someran tendaron de Verda Junularo, la porjunulara organizo de Sveda Verda partio. La du kune laboras por verda politiko, kiu baziĝas sur solidareco kun bestoj, homoj kaj naturo.

Kelkaj el ni konis unu la alian, sed mi men ne konkantis ilin antaŭe. Pri la esperantokurso en Lesjöfors mi aŭdis dum la tendaro kaj decidis iri tien nur la nokton antaŭ la forveturo.

Allan Lindestam, Norrköping

Ni estas helpantoj en Esperanto-Domo dum la somera kurssemajno. Kiam estas multaj gastoj ĉi tie, Lernart ja ne sola povas fari ĉion. Li konis kelkajn el ni de pli frue; tial li demandis, ĉu ni povus helpi. Do ni iom puri-

gas, ekzemple necesejojn, duŝejojn, koridorojn. Ni ankaŭ helpas en la kurio, lavante manĝilaron, preparante manĝojn kaj simile. Matene kaj foje posttagmeze ni ne laboras, ni anstataŭe partoprenas en la kurso de Anna-Maria Lange. Ni opinias ke ĝi estas tre bona kaj ni ege ŝatus reveni iam.

KarinMalin Engström, Umeå

Por ni estas bonege rajti esti ĉi tie, ĉar kvar el ni iros al IJK en Rusio kaj tiam estos bone kapabli paroli, almenaŭ iomete. Tomio kaj Tinos estis en la pasintjara IJK en Lesjöfors, sed ni aliaj ne partoprenis en iu esperantokurso. Dum la IJK Anna, Karin, Malin, Tomio kaj kelkaj aliaj el la muzikgrupo La Perdita Generacio havos koncerton

Anna Bromée kaj Anna Burenius, Frösön

Hodiaŭ estis bona tago. Unue ni lernis pri substantivo, subjektivo kaj akuzativo ... kaj ni kantis: Nun estas la hor' por studo kaj labor'. Poste estis tagmanĝo bongusta. Posttagmeze ni aŭdis pri Ludoviko Zamenhof. Post vespermanĝo mi ludis violonon kaj per mia pupo. Baldaŭ mi iros dormi.

Dominika Handzlik, 10-jara

En la tria tago ni komencis legi libron kun la titolo "Vojaĝo kun Katrina" de Sten Johansson. Ĝi temas pri Katrina, instruistino en Svedujo, en plurnacia klaso. Ĝi estas facila kaj instruas multajn vortojn. La teksto estas tute ordinara, tamen facila, kaj la historio estas interesa kaj pri aktualaj temoj. Mi ankoraŭ ne finlegis ĝin, sed ĝis nun mi trovas ĝin bona.

Viktoria Strid, Järna


Unu partoprenanto legis propran verkaĵon, dum la kurso tradukitan esperanten:

Fi kaj hu, kiel malhigiene naŭze, homoj nudpiedaj en nutrajvendejo, diras viro, kies ŝuoj ĵus surtretis hundfekaĵon.

Konstantinos Erlandsson, Sandviken

"Ĉiu momento estas vojaĝo" estas la titolo de kanto prezentita fine de la sinprezento de la volontula grupo. kantis kaj ludis Timio, Anna Bu kaj KarinMalin. La muzikgrupo estis fondita en Skellefteå, sed nun la anoj vivas dise en la lando. Ili nur lastatempe kantas en Esperanto. La teksto aperas en alia loko en tiu ĉi numero de *La Espero*.

La knabo, kiu volis fariĝi verkisto



Ilustraĵo el la originala eldono.

Tiu ĉi rakonto publikigis en la libro "Du mirrakontoj", eldonita en Nürnberg en 1898. Ĝi estis verkita en lingvo, kiu tiam havis nur dekunu jarojn. La lingvaĵo estas tre simila al moderna Esperanto, sed vi eble povas trovi kelkajn arĥaikajn trajtojn en la rakonto.

Tie sur la deklivo, ĉe l'rando de la arbaro estas la vilaĝa lerneja domo, ĉirkaŭita de verdaj arboj kaj arbetoj. Vere, ne estas la lerneja domo granda, ankaŭ ne multe belegita, ĉar la vilaĝo plendinde estas tre malriĉa kaj malgranda, sed tamen la feliĉo loĝas tie, kaj la maljuna instruisto, kun barbo kaj haroj grizaj, estas kontenta kaj ĝoja je sia malgranda mondo. Li konas la tutan vilaĝon, kie li longtempe semadis la vorton de Dio, kaj li estas konata de ĉiuj vilaĝanoj, amata kaj honorata de ĉiuj, junaj kaj maljunaj.

Ni trovas lin unu helan someran vesperon, en aĝo de ĉirkaŭ 50 jaroj, sidantan antaŭ sia malgranda dometo sur la ŝtuparo, ĵus finintan sian vesperan laboron, flegi siajn florojn kaj forigi la sarkafon, kiam li, levinte la okulojn, ekvidis unu el siaj lernantoj. Li amike salutis la knabon, kiu estis la plej diligenta el ĉiuj liaj infanoj kaj, donante la nianon, diris:

"Bonan vesperon, Johan Olof."

"Bonan vesperon ankaŭ al vi," respondis la knabo, turnante la ĉapelon inter la manoj. "Vi ĝojas kiel mi en la bela klara vespero?"

"Jes, jes mia knabeto; mi ĝojas je tio. Dio en sia amo donis al ni homoj tiun ĉi belan vesperon, kaj al mi maljunulo li donis ankaŭ klaran vesperon post longa tago de laboro. Vi komprenas, mi parolas pri mia vivo kiel pri longa tago, kaj la maljuna aĝo estas la vespero. Sed vi, mia filo, vi estas ankoraŭ en la floranta mateno de l'vivo. Sed vi, mia filo, vi havas, kiel ŝajnas al mi, sur la koro ion, kion vi volas preparoli kun mi, kun mi via instruisto. Sidigu apud mi sur la ŝtuparo; ne timu diri; se vi havas ion

malĝojan, sciigu ĝin al mi."

La knabo daŭrigis turnadi la ĉapelon inter la manoj.

"Jes, sciu," li fine diris, mallevinte la okulojn al tero, "estas vere, kion vi diris, mi estas ankoraŭ en la mateno de vivo. Mia patrino ankaŭ diris ĝin hodiaŭ.

"Kaj vi venis por paroli pri tio kun mi?"

"Jes, sinjoro."

"A do," diris la maljunulo, "vere via patrino parolis, vi estas juna. Sed via patrino estas jam maljuna kaj vidvino kaj en granda malriĉeco. Vi devas nun en juneco fari ĉion, kion vi povas por helpi kaj ĝojigi ŝian laboron. Ĉu vi ne volas ĝin mia knabeto?"

"Ho jes, mi volas; sed la patrino ankaŭ diris hodiaŭ ke ŝi jam ne povas nutri min plu kaj teni min en lernejo. Mi havas jam dektri jarojn, diris ŝi, mi devas mem perlabori mian panon; kaj tion ĉi mi volas, kaj se eble ankaŭ fari ion al ŝi, ĉar ŝi estas tiel bona, la patrino."

"Jes, tio esta justa. Amu la bonan patrinnon, kaj ankaŭ ne forgesu ami Dion super ĉio. Sed kion vi intencas fari?"

"Mi intencas labori, sinjoro; labori por mia nutro. Sed ne kiel aliaj labori en tiu ĉi vilaĝo; mi estas tro juna."

"Kiel vi do intencas labori, mia amiko, se ne kiel aliaj viroj de tiu ĉi vilaĝo? Dio benas honestan laboron."

"Jes, mi scias, sed mi plu volonte prenis ian metion."

"Jes, certe, kaj kian metion vi deziras? Forĝistado? Tre bona metio, la fulgo faros nenian malbonon, se vi cetere tenos vian nomon kaj koron pura. Meblistado? Ni bezonas tion, ĉar la meblisto de l'vilaĝo estas jam maljuna."

La knabo silentis.

"Pentristado?" daŭrigis la maljunulo, "bona metio, sed ĝi ne donus tian bonan enspezon; ni estas malriĉaj. Kudristado? Botistado?"

La knabo daŭrigis silenti.

"Kion vi do deziras?" demandis la

instruisto. La knabo nenion respondis. Tio estis ĵus la plej delikata punkto por la junulo; turninte ankoraŭ kelkajn fojojn la ĉapelon inter la manoj, li apenaŭ aŭdeble respondis: "mi deziras fariĝi verkisto."

"Verkisto!" la maljunulo apenaŭ kredis siajn orelojn. Tio estis tiel neatendite.

"Jes verkisto," la knabo rapidis respondi, mi ja legis pri Robinson kaj liaj aventuroj, kaj multajn aliajn librojn el la libraro de nia pastro, kaj mi ankaŭ dezirus povi verkadi tielajn librojn."

"Sed vi bezonas vivi, knabeto mia, kaj ankaŭ helpi vian patrinnon en ŝia maljuneco. Vi ne havas tempon skribadi tiel multe, vi devas labori."

"Jes, sed mi aŭdis, ke verkistoj por siaj libroj ricevas multon da mono."

"Vere, se iliaj verkoj estas bonaj, sed se la verkoj estas malbonaj, neniu aĉetas kaj la aŭtoro malriĉiĝas."

"Mi ne verkos aliajn krom bonajn librojn, tiajn kiel "Vojaĝo de Kristano", kaj tielajn; mi tute ne skribos malbonajn kaj malverajn verkojn."

La larmoj preskaŭ alvenis al okuloj de l'knabo ĉe la penso ke la instruisto kredas ke li verkos malbonajn verkojn.

"Mi scias tre bone, mia knabo, ke vi estas diligenta knabo kaj ankaŭ bona knabo; vi faros nenian malbonon se vi povos fari bonan. Jes, se vi povas. Bonan volon vi havas, sed la povon. . . Diligenta vi ĉiam estis en la lernejo; sed legi jam pretan libron estas tute malsama ol krei novan; mi pensas, ke vi multe eraras en tio. Fariĝu honesta laboranto kiel via patro estis en vivo."

"Sed la patrino diras, ke la patro malsaniĝis kaj mortis pro multeco da laboro."

"Via patro mortis pro laboroj tro grandaj, sed precipe. . ."

Li ne daŭrigis. Se la vidvino ne diris la kaŭzon de la morto de l'edzo, li ankaŭ ne sciigos al la knabo ke la vera kaŭzo de la morto kredeble estis la drinkemeco, pro kiu malfortiĝis la korpo kaj fariĝis maltaŭga al laboro.

"Mia filo, kedu min, vi forigu tiajn pensojn, kaj fariĝu laboristo kiel la aliaj junuloj de la vilaĝo!"

"Ha, sed mi tamen ekprovos; mi sentas enuon je vilaĝa laboro."

"Sed mi pensas ke vi ne taŭgas por tio."

"Mi ekprovu."

"Bone, bone; alportu mian bastonon; ni iru iom kune sur la ebenaĵo kaj en arbaro, priparolante la aferon."

La bastono estis alportita, kaj ambaŭ iris kune al la vilaĝa ebenaĵo. Tie kreskis granda nombro da malsamaj floroj kaj herboj, farante tre belan tutaĵon kun la arbaro. La maljunulo ekhaltis ĉe la bordo de rivereto, prenis unu floreto kaj donis ĝin al la knabo dirante: "Vidu, kiel bela estas tiu ĉi! tie estas preta floro, tio estas burĝono kaj tie . . . sed diru vi mem, skribu nun verketon pri tiu."

"Pri tiu?" la knabo ekmiris, "pri tiu! Ĝi estas floro kaj burĝono kaj . . . kaj . . . nenio plu."

"Jes, sed tamen vi vidis en printempe la junan herberon kiel timante ĝi levis la kapon, antaŭ nelonge ŝarĝitan de neĝo. Dio ĝin vekis. Dio ĝin vestis en tiun ĉi helan veston, kiun vi vidas, kaj tie el la burĝono venas dua floro. Pluvo trinkigas ĝin, fundo nutras ĝin. Dio ŝirmas ĝin. Kaj en aŭtuno ĝi estos falĉita, kiel nutraĵo por bovinoj en vintra tempo, kaj ni havos lakton. Ĉu vi ne povas skribi pri tio, ne grandan verkon, sed mallongan artikolon?"

"Mi kredeble ne povas. Mi tute ne vidas mirindaĵon en tio."

"Kaj la rivereto? Skribu pri ĝi."

"Pri la rivereto! Pri ĝi estas ankoraŭ pli malmulte skribi ol pri floroj."

"Ne diru. Verkisto devas ekkoni en en floroj kaj riveretoj multajn mirindaĵojn. Skribu, kiel la suno levas el la maro nubojn, el la nuboj venas pluvo al la soifanta tero; kiel la floroj kreskas, la ebenaĵo verdiĝas, la superflua akvo kolektiĝas en rivereton, kiu movigas la muelilojn; kiel ni ricevas farunon por pano, havas fiŝojn al pano kaj multajn aliajn bonojn; kiel la akvo kolektiĝas el ĉiuj riveroj en maron, kiu portas ŝipojn, kaj ni havas per tio produktojn de malproksimaj landoj. Sed mi vidas ke vi ne skribas pri la naturo; eble vi skribas pri aliaj aferoj? Ni iru al la vilaĝo."

La knabo preskaŭ plorante apenaŭ povis dire eĉ unu vorton.

Ili alvenis al malgranda monteto apud la arbaro sur kies deklivo estis malgranda korteto. En la varma hela somera vespero aŭdiĝis klara rido el la dometo, helaj voĉoj de du infanoj de

sia ankaŭ maljuna edizon pri pasintaj tempoj.

"Ĉu vi vidas?" demandis la instruisto.

"Mi vidas ĉion," respondis la knabo, "kaj mi bone konas ĉiujn tiujn homojn; tio ĉi estas la maljuna meblisto kaj lia edzino. Kia mirindaĵo estas tio?"

"Kaj ĉu vi konas la junulon kaj la junulinon kiuj ĵus iras en la alian domon?"

"Jes mi konas ilin tre bone; ĝi estas la filino de l'meblisto kaj la filino de l'najbaro."

"Sed vidu, kiel singardeme ili iras en la arbaron. Ili kompreneble ne volas ke iu vidu ilin kune."

"Kredeble; sed kia mirindaĵo estas tio? Oni ja ne povas skribi libron pri tio. Ili sin tiel renkontas tre ofte."

"Nature, tielaj estas junuloj. Sed ni proksimiĝu kaj aŭskultu, kion diras la maljunuloj. Aŭdu!"

La knabo aŭskultis, kion diris la maljunulo.

"Jes mia kara edzino," diris la meblisto, "jam forflugis tridek jaroj de tiu tago, kiun ni memoras. Ĉu vi memoras, kiam mi unufoje prenis vian manon ĵus tie en la arbereto kaj . . . kaj . . ."

"Jes, mi ĉion memoras kiel hieraŭ. Vi ofte ankaŭ antaŭe prenis mian manon por saluti, sed neniam tiel. Mi sentis ion tie ĉi," ŝi metis la manon al la brusto, "jes Dio estas bona."

"Kaj se nun la filo prenis bonan edzinon, ni povus ambaŭ lasi niajn kapojn al ripozo."

"Kaj nun, bona knabo, ni aŭskultis sufiĉe; skribu nun belan historion pri la vivo de tiu ĉi honesta meblisto kaj pri lia feliĉa vivo kun lia bona edzino."

"Pri tio? Mi ne komprenas. Li kredeble baldaŭ mortos, kaj la filo fariĝos meblisto, ĉar ankaŭ li iom lernis la metion, kaj li edziĝos kun tiu knabino kaj havos infanojn kaj poste . . . mi ne scias: tie estas nenio por skribi."

"Sed kion vi do povas verki? Mi timas ke vi nenion povas."

"Pri milito, pri sovaĝaj insuloj kaj sovaĝuloj kiel Robinson, kaj cetera."

"Ha, pri sovaĝuloj! Jes, ni iru al la drinkejo en la dua rando de l' vilaĝo. Tie estas sovaĝuloj en ĉiu tempo de la tago. Vi skribos pri ili, kiam vi sufiĉe ekkonos ilian vivadon."

La knabo paliĝis.

"Ni ne iru tien," li fine murmuris. "Mi tiel timas la sendian vivadon tie; mi ne volas vidi ĝin, nek skribi pri ĝi. La patrino ĉiun vesperon preĝas al Dio, ke mi neniam iru tien."

La instruisto eksopiris, sed bladaŭ lia vizaĝo lumiĝis.

"La patrino," diris li, "vi amas la patrinojn? Ĉu vi povos skribi pri la amo de via kara patrino?"

"Jes, pri tio, mi skribos pri tio", ĝojkriis la knabo, "jes pri tio. Mi skribos tutan dikajn libron, ĉar ŝi estas pli bona ol iu alia. Ni iru viziti ŝin, kaj vi

instruu min, kion oni devas skribi."

Ili foriris en la direkton de la dometo de la malriĉa vidvino. De l'pinto de alia alta loko jam vidiĝis la dometo kaj ankaŭ la maljuna virino, de kies eksteraĵo facile vidiĝis, ke malriĉeco kaj zorgoj fleksis ŝin al tero. En ŝia mano estis hakilo, kiun kiu ŝi diligente hakadis lignon por la verspermanĝo.

"Tie esta la patrino, mia kara patrino, sed . . . sed . . . ŝi hakas lignon, kaj mi, juna knabo, mi hontas konfesi, ke mi nenion faris la tutan posttagmezon."

"Vi do skribos pri tio?"

"Mi ne havas nun tempon paroli pri skribado, mi devas nun iri por helpi la patrinojn. Ni parolu pri verkoj iun alian vesperon."

Sed iu alia vespero neniam venis. Vere, la instruisto ofte vizitis la domon de la vidvino, renkontadis ankaŭ la knabon, kaj estis sciema, kion li skribas pri sia amata patrino. Sed forkuris tagoj kaj semajnoj kaj monatoj, kaj la 'tuta libro' restis neskribita. "La patrino malsaniĝis," ĉiam respondis Johan Olof al la demandoj de sia instruisto, "ne taŭgas nun skribi, kiam la patrino estas malsana. Sed la patrino saniĝos, kaj tiam, jes tiam."

Li vere havis iom da papero kaj ankaŭ peceton da kraĵono, sed tempon ne. La stato de la patrino malpliboniĝis iom post iom kaj antaŭ la fino de la jaro ŝi donis longan adiaŭan kison al sia filo, kaj iris tien, de kie neniu revenis. Ŝi mortis.

La knabo, kvankam ankoraŭ tre juna, devis servadi al aliaj homoj por perlabori sian panon, ĉar li estis malriĉa. Lia tuta heredo estis la adiaŭa kiso kaj la beno de la patrino.

Sed la libro restis neskribita.

Estis varmeta bela somera vespero. Mi estis sidanta sur ŝtono ĉe la bordo de rivereto, ĝojante je la boneco de la ĉiopotenca Dio. Apude floris hontema rozo kaj proksime kreskis forta kaj alta pino. Tiam, mirinde, mi klare aŭdis kiel la najtingalo, kantinta sur la branĉoj de la pino, komencis paroli.

"Jes, karaj amikoj," diris ĝi, "jes tiel estas; Dio estas bona; sed nun, frato rivereto, komencu vian promesitan rakonton." Kaj la rivereto rakontis la historion pri la juna knabo kaj la libro, kiu ĉiam restis neskribita, kaj la pino atestis ke tio ĉi estas vero. "Mi estis tiam nur malgranda arbeto, sed mi ĝin bone memoras", diris ĝi.

"Ĉu vi aŭdis la finon de la rakonto pri la knabo kiu volis fariĝi verkisto?" demandis la najtingalo post la silentado. "Ne, ne" respondis la rivereto, "mi vere aŭdis, ke mortis la patrino, kaj la knabo fariĝis servantulo; ankaŭ mi lin vidis iajn fojojn iri sur la ponto super mi, maljunulon nun kaj griz-



La kovrilo de la originala eldono.

ĉirkaŭ dek jaroj, kaj sur la ŝtuparo sidis la maluna majstro parolante kun

barbulon; sed mi ne havas mian vojon en tiu direkto de la vilaĝo, ĉar jaro post jaro mi bruadas tie ĉi kaj turnas la radojn de la muelilo, tiel multe kiel permesas tempo kaj fortoj. Tial, amiko rakontu!"

"Rakontu, rakontu!" petis ankaŭ la pino kaj la floreto.

"Sed la homo tie, ĉu li ne komprenas kion mi diras? kaj eble li faros al ni malbonon?"

"Ne timu, amiko, la homoj havas sian propran propramon, sian monon, siajn idolojn, ili komprenas nenion de la lingvo de kreitajo; ili eĉ ne havas tempon por tio."

Mi ekridetis por mi mem. La rivereto ŝajne ne sciis, ke mi komprenas esperanton.

"Jes, mia rakonto estas mallonga. La knabo restis en servado multajn jarojn, kolektadis monon diligente, kaj la bezona mono estante kolektita, li lasis meti belegan monumenton sur la tombo de sia patrino."

"Kredeble marmoran monumenton; ĝi estas ja la plej bela", diris la rozeto.

"Ne, mia infano; certe belega, tamen ne laŭ la opinio de homoj maldiaj, sed laŭ la opinio de la sanktaj anĝeloj de la ĉielo. mia kuzino, la alaŭdo, kiu ofte en siaj himnoj flugas

ĝojkrie ĝis la pordoj de la ĉielo, diris unufoje, ke ŝi aŭdis la feliĉegan patri-non preĝi Dion por sia filo. Mi ne scias ĉu tio estas vera, ĉar mia kuzino ofte estas en ekstazo: estas tamen certe, ke la filo eĉ unu fojon ne iris al la drinkejo, kaj tio estas belega monumento sur la tombo de ĉia patrino. Cetere li ankaŭ metis pentritan lignan monumenton tien, kiu kostis tridek kronojn, — multe da mono por malriĉem en tiu pasinta tempo, kaj li mem skribis la epitafion."

"Lasu nin aŭdi la epitafion," petis la sentema rozeto, en kies okuloj brilis klaraj larmoj. La homoj, kiuj kredas la naturon malvivan, nomas ilin roso.

"Tuj, tuj", respondis la birdo, "ĝi estas tre mallonga :

"Al patrino, de ŝia knabo.

Atendu min en ĉielo, mi venos, kiam Dio vokos."

Klara akva guto elsaltis el la branta rivereto, kaj falis sur mian manon. Ĉu ne estis larmo, kiun verŝis la rivereto pro ĝojo pri tio, ke ankoraŭ en tia peka monto ekzistas fajrero de sankta amo Dia.

"Kaj ankoraŭ, ĉiun sabatan vesperon, la laboro de la semajno estante finita, li iras al la tombo de la patrino, purigas kaj sarkas ĝin, ke ĝi estu la plej bela de la tuta tombaro."

En tiu momento per solena voĉo komencis la preĝejoj sonorilon sonadi trans la klara vespero. Jes, estis sabata vespero, estis tempo por vekigi el miaj pensoj kaj iri hejmen. Mi levis min kaj foriris. Sed kiel adiaŭan saluton mi aŭdis la najtingalon sopirante diri al siaj amikoj: "Ho tiuj homoj, la voĉon de la malviva sonorilo ili aŭdas, sed la voĉon de la naturo ne; la vokon de la metalo ili honoras, sed la internan vikon de Dio en ilia koro neniam . . . almenaŭ la plej multaj", aldonis ĝi singardeme.

Mi foriris; tamen ne tuj hejmen, sed al la vilaĝa tombaro, por vidi, ĉu ankoraŭ la maljunulo vizitadas la tombon ĉiun sabatan vesperon. Kaj ĝuste, tie li estis. Li jam finis sian laboron kaj nun post ĝi deviŝis la ŝviton de la frunto. Ridetante kun ĝojo, li ankoraŭ unu fojon rigardis la tomban monumenton, sur kiu apenaŭ unu litero estis ankoraŭ legebla. Li murmuris al si mem : "Mi venos, kiam Dio vokos. Mire! Mi intencis unufojon fariĝi granda verkisto, sed ĉio, kion iam mi verkis, estas tio ĉi, kaj tio kredeble ankaŭ restus nesribita, se ne estus mia patrino, kiu ripozas tie ĉi.

Otto W. Zeidlitz

DEBATT

Fortsättning på debatten om Esperantorörelsens framtid

"Endast upplysta kan diskutera problem och finna lösningar."

Bengt Nordlöf

Först vill jag framföra min uppskattning för att Bengt Nordlöf verkligen satt igång en debatt som länge varit önskvärd.

Just nu vill jag kommentera Bengts senaste inlägg i *La Espero* på endast en punkt — att kommentera allt skulle nog bli alltför utrymmeskrävande. Bengt nämner att Eldona fick ett arv för några år sedan. Jag vill sätta in det i ett historiskt perspektiv.

Från Eldonas bildande 1918 till mitten av 40-talet skötes Eldona alldeles utmärkt på ett professionellt och affärsmässigt sätt. Under hela denna tid och ännu längre subventionerade Eldona SEF med stora summor varje år. 1937 framhåller SLEAs ordförande, riksdagsmannen Ernst Eriksson, i ett brev till Eldona, att Eldona bör vara hela den svenska esperantorörelsens företag och ha likvärdiga relationer till SLEA och SEF. Eldona hade då under ett år subven-

tionerat SEF med minst 2.500 kr. och det var mycket pengar på den tiden. Erikssons önskemål tillbakavisades av Eldonas styrelse.

I en rapport om debatten på kongressen 1944 kan man läsa detta: "Herr Bernhard Eriksson framhöll att Esperanto-förlaget tagit som sin uppgift att avlasta tidningsbekymren från SEF:s styrelse och icke dragit sig för att bära den ekonomiska förlust på 2.000 à 1.500 kronor per år om detta inneburit. Förlaget är Esperanto-Förbundets ekonomiska ryggrad." Bernhard Eriksson var den siste professionelle affärsmannen i Eldonas styrelse. Han avgick 1946.

Tom Paul Nylén, som inte var särskilt entusiastisk inför bildandet av förlaget, erkände 1943 att "... förlagsföreningen har alltid varit vår rörelsens livsnerv. Utan den skulle vi inte nu stå där vi står."

Så var alltså förhållandet mellan Eldona och SEF. Men efter kriget inträffade en radikal förändring i detta förhållande. Det, som Eldona tidigare i kraft av god ekonomi och god sköt-

sel frivilligt kunnat göra för SEF, började man att betrakta som Eldonas *skyldighet* gentemot SEF. Det mest härresande exemplet på detta är, när LKK inför UK i Malmö 1948 krävde att förlaget under kongressveckan skulle ge ut en ny bok per dag. Och det var inga små böcker, sammanlagt rörde det sig om tusen sidor eller mer. Kravet var ju fullständigt orealistiskt och förverkligades inte. Liknande krav återkom från SEF:s styrelse inför SEF:s 50-årsjubileum. Lyckligtvis kunde inte heller det förverkligas, den gången p g a brist på översättare.

Denna nya inställning till förlaget och i viss mån också inom förlaget förde, tillsammans med ett par andra omständigheter, till sammanblandningen av SEF:s och Eldonas ekonomier, fram till en allvarlig likviditetskris på 90-talet, ur vilken Eldona räddades genom det arv, som Bengt nämner.

Bengt skriver så här: "... men om arvet fortsätter att krympa i den takt det uppenbarligen gjort hittills, så är det en tidsfråga när det åter blir kapi-

La gotlanda sagao (komenca parto)

Gotlandon trovis unue viro, kiu nomiĝis Thjelvar (1). Tiam Gotlando estis tiel sorĉita, ke ĝi tage sinkis kaj nokte estis supre. Sed tiu viro unue portis fajron al la lando, kaj poste ĝi neniam sinkis.

Tiu Thjelvar havis filon, kiu nomiĝis Hafthi. Kaj la edzino de Hafthi nomiĝis Blankastelo. Tiuj du unue loĝadis en Gotlando.

La unuan nokton, dum kiu ili dormis kune, ŝi sonĝis, ke tri serpentoj interplektiĝis en ŝia brusto; kaj ŝajnis al ŝi ke ili rampis el ŝia brusto. Tiun sonĝon ŝi rakontis al Hafthi, sia edzo. Li interpretis la sonĝon tiel:

Ĉio estas ĉenere ligita.
Loĝita lando ĉi tio estos,
kaj ni tri filojn havos.

Guti posedos Gotlandon,
Graipr nomiĝos la dua
kaj Gunfjaun la tria.

Tiuj poste dividis Gotlandon en tri trionojn, tiel ke Graipr, la plej aĝa, ricevis la nordan, Guti la mezan kaj Gunfjaun, la plej juna, la sudan.

Poste el tiuj tri plimultiĝis la popolo en Gotlando tiom, dum longa tempo, ke la lando ne plu povis nutri ĉiujn. Tiam oni per lotoj ekziligis ĉiun trian viron, kaj ili decidis, ke tiuj ĉion posedos kaj kunportos, kion ili havas su-

per la tero. Poste ili malŝatis foriri, sed iris al Thorsborg (2), kaj tie ili loĝadis. Poste la lando ne volis ilin toleri, sed forpelis ilin de tie.

Poste ili foriris al Faroy (3), kaj tie ili loĝadis. Tie ili ne povis vivteni sin, sed iris al insulo apud Estonio, nomita Dagaithi (4), kaj tie ili loĝadis, kaj konstruis kastelon ankoraŭ videblan. Ankaŭ tie ili ne povis vivteni sin, sed iris supren laŭ rivero nomita Dyna (5).

Kaj supren tra Ruslando tiel foren ili iris, ke ili venis al Greklando. Tie ili petis de la greka reĝo (6) la rajton loĝi dum la luno kreskos kaj ŝrumpos.

La reĝo tion promesis al ili, kredante ke ne temas pri pli ol monato. Kaj post monato li volis forkonduki ilin. Sed ili respondis ke la luno kreskos kaj ŝrumpos ĉiam, kaj ili diris, ke tiel oni promesis.

Pri tiu ilia disputo fine aŭdis la reĝino. Tiam ŝi diris: "Sinjoro reĝo mia! Vi promesis al ili loĝi dum la luno kreskos kaj ŝrumpos. Tio signifas por ĉiam. Tiun rajton vi ne devas forpreni de ili." Tiam ili tie loĝadis, kaj ankoraŭ loĝadas, kaj ankoraŭ ili havas iom de nia lingvo (7).

(1) Thjelvar: La pragotlanda nomformo Thjelvar

(Thjelvar) estas identa kun la pranorvega/praislanda nomo Thjálfi; persono kun tiu nomo aperas en du rakontoj en la Eddo de Snorri (la Proza Eddo), kiel servanto de Toro (Thórr), kaj laŭ ĝenerale akceptita teorio temas pri la sama mita persono.

(2) Thorsborg (Thórsborg): moderngotlande Toursburgi, svede Torsburgen; altaĵo kovrita de densa arbaro proksime al la orienta marbordo de Gotlando.

(3) Faroy: svede Fårö; la due plej granda el la gotlandaj insuloj, nordoriente de la ĉefinsulo. Tien fuĝis ne nur tiuj pratempaj gotlandanoj, sed nia tempe ankaŭ Ingmar Bergman (kiu, malsame al ili, estis permesita restadi).

(4) Dagaithi (Dagaithi): svede Dagö, estone Hiiumaa.

(5) Dyna: latve Daugava, ruse Dvina.

(6) La greka reĝo: Verŝajne temas pri la orient-romia imperiestro en Konstantinoplo.

(7) Kaj ankoraŭ ili havas iom de nia lingvo: estas historia fakto ke dum longa tempo, la persona gvardio de la orientromia imperiestro dum la vikinga epoko konsistis el viroj el la orienta parto de Skandinavio, do svedoj kaj gotlandanoj.

Tradukis: Gunnar Gällmo

fortsättning från sid. 11

talbrist och problem med nytugivning."

Jag jublar när jag läser detta. Om jag själv överhuvudtaget har gjort något för förlaget är det detta: ända sedan förlaget fick arvet på 180.000 har jag intensivt försökt övertyga om att förlaget därmed fick en oförtjänt chans, som måste vårdas. Men jag och den sparsamma delen av styrelsen har inte helt lyckats. Så sent som förra året inträffade både dränering och försök till dränering av förlagets tillgångar. Men Bengts kommentar visar att *insikten* börjar spridas, och det är utomordentligt viktigt. Om, eller när, den kris, som Bengt talar om, slutar med en eller flera krisdrabbade organisationers kollaps, då är det viktigt att ett blomstrande Eldona finns kvar för att hålla esperanto vid liv i Sverige.

Bertil Nilsson

(daŭrigo el p. 7)

lo. Birgitta preparis lunĉon kun mulaj bongustaj manĝaĵoj. Kerstin venigis hejmen Harold kaj okazis agrablan renkontiĝon kun li. Estis vespermanĝoj ĉe kandeloj kaj kantado da esperantaj, svedaj kaj polaj kanzonoj.

Sabate ni veturis kun Margret kaj Kerstin al meandroj de la rivero Em. Tiu ĉi rivero pelas siajn akvojn rapide kaj abunde estante vera ornamo de tiu ĉi regiono, ornamo de Smolando. Abrupta falo de akvo kaŭzita de diferencoj de terennivelo estis utiligita por konstruo de muelejoj, elektrejoj, produktejoj. Oni faris digojn, akvorezerujojn. Foje la rivero trankviligis, foje ĝi fluas rapide kun plaŭdop aŭ eĉ kun bruo. Emán prezentigis en diversaj aspektoj fluanta tra freŝa naturo kaj ĝi diras: "Mi estas bela rivero, admiru!"

Jam posttagmeze ni venis al Källströmsgården — kafejo kun amuza, fantazio ekspozicio ĉirkaŭe, iam domo kaj studio de fama skulptisto Arvid Källström (1893-1967). Aten-

ton nian allogis giganto havanta en la buŝo fajflon (fluton), kiu fajfas, kiam blovas vento. Li rigardas al la maro, al la insulo videbla en malproksimo, nomata la insulo de sorĉistinoj. Laŭ malnova legendo sur tiu ĉi insulo vivas sorĉistinoj. Li volas fajfi, doni signalon al sia fianĉino — sorĉistino.

La dua tre interesa skulptaĵo de la kafejo estas fantasta orgeno je vento, ankaŭ giganta, kun enmasonitaj multaj boteoloj, kiu eldonas sonojn — ludas, kiam blovas la vento. La orgeno estas ornamita, kolora, havas interesan formon. Same la giganto fajfanta al la insulo de sorĉistinoj estas tre kolora kaj brilanta. Li estas iom belaspekta, iom timiganta. En tia ĉi eksterordinara ĉirkaŭo ni fortigis ni per kafo.

Ni restas kun agrablaj rememoroj kaj sincera dankemo al niaj karaj svedaj geamikoj.

Diniela Emler, Andrzej Witt
Gdynia

La artikolo estas mallongigita. Red.

Med detta inlägg förklaras denna debatt avslutad.

Redaktören

Kelkaj partetoj de la libro "De Tago al Tago"

La parto: **Libereco**

Marondoj frapas per egalintertempoj la marbordon de El Mehdi. Ventoj balancas palmarbojn, karesas mian nudan korpon dum nokta birdo kantas tre mallaŭte en afrika nokto. Kontraŭborde vidiĝas la silueto de Mahdia kun la minareto. Tie dormas multaj subĉiele meze de ruinoj havante maton eble nur mantelon kiel liton. Fermiĝis jam belegaj okuloj de infanoj, ili sonĝas.

Dormu – infano de Tuniso – kolektu fortojn. En vi troviĝas estonteco. Vi konstruos ĉambrojn, fosos putojn, faros akvotu-barojn. Kresku viaj olivarboj, donu grandajn rikoltaĵojn, tiel grandajn, ke vi mem havos rajton uzi oleon de unua premado.

De alta montpinto ŝprucakvas freŝa akvo gaje saltante de ŝton' al ŝtono, turniĝas ĉirkaŭ si mem, ŝaŭmas balanciĝanta en fosaĵoj, daŭrigas sian iradon, envolvas ĉiun ŝtonon, ĉiun gruzeton rapide en sian malsekan sinon, ŝmirgas akrajn randojn, formas glatajn ŝtonovojn.

Iranto sentas sin trankvila surbordoŝtone, admiras liberecon de la fluo, tralavas siajn lacajn piedojn en freŝa riverakvo, lasas vojaĝpolvojn en fluanta akvo.

La parto: **Hompapilioj**

Vestitaj en kaŭĉukaj botoj, envolvitaj en multkoloraj plast-manteloj homoj kiel papilioj en printempa pluvado: blufugiloj, pierisoj, bravaj makaonoj, en grizaj manteloj vestitaj tineoj: ĉiuj unikaj en siaj specoj.

Ĉi tie ni kolektiĝas en la finstacio de antaŭurbo nigraj kaj oblikvokulaj, naturondhararaj kaj per konstanta frizo ondumitaj. Homoj en malgrandaj grupoj kiel aŭtunaj fungoj ĉiu en sia propra kolonio. La najbaro tutproksime – ili ne komprenas unu la alian.

La parto: **Kune kun kompanio**

Timema homo rifuĝas, trovas lokon en rokkaverno. Tie li estas bonege ŝirmita de bomboj kaj raketoj de malamikoj. Ene en la kaverno ĉirkaŭita de ŝtonaj muroj li batalas kun siaj propraj egoj, krias helpon, sed neniu povas aŭdi kriojn de homo, kiu fermis sin en rokkaverno.

La parto: **Silentaj paŝoj de ombroj**

Portante la hieraŭajn pezojn mi alproksimiĝas al bordo. Brilas klare riveretakvo, fontoŝtonoj klare videblaj glitaj, danĝeraj kaj mi devos transiri la rivereton, atingi la bordon aliflankan. Al la aliflanka bordo mi portos miajn pezojn, metos ilin sub pice-branĉetojn, entombigos ilin. Tie ili restos, sed – la fontoŝtonoj estas glitaj . . . danĝeraj. Sed – ĉu mi devas porti la hieraŭajn kiel heliko sian malmolan hejmon?

Akvo fluas . . . kien? eble en riveregon, el riverego en senfundan oceanon . . . Miajn pezojn mi ĵetas . . . en la fluon. La fluo ĉirkaŭumas ilin, ekprenas en sian malsekan sinon . . . kunportas pli foren . . . pli foren . . . en nevideblecon . . . kaj . . . mi ne bezonis iri sur la glitaj ŝtonoj al la aliflanka bordo, ne meti la hieraŭajn sub pice-branĉetojn tie – La Akvo ilin forprenis.

Miaj pensoj multfoje revenas al la pasinteco. Tie mi renkontas ilin, kun kiuj mi ludis infanece, aŭskultis kaj legis fabelojn pri amikaj feoj kaj pri malamikaj sorĉistoj. Kaj la fabeloj ĉiam finis feliĉe.

Kiel do hodiaŭ? Mi ne plu estas infano, ne eĉ juna, post mi estas la longa vojo. Mi konstatas: Kun la fabeluloj de mia infaneco mi renkontiĝis vervivantaj: mi devis batali kontraŭ teruraj sorĉistoj, sed ankaŭ amikajn feojn mi renkontis. Kia feliĉo, se ankaŭ mia vivo finfine finus kiel en mia fabelmondo: feliĉe.

Fatala terapio

Plankopuluristo Grondel ekzistis dank' al bonŝanco. Post lia alveno en ĉi mondon lia patrino rapidis formeti lin en arbaron, celante lian kaŝan malaperon. Horojn poste tamen la hundo de iu frumatena ĉasisto per forta ekbojo subite atentigis sian majstron pri trovaĵo, ĉifonopakita, plorpepanta etulo.

Savita la infaneto venis en orfejon, kreskis kaj evoluis en ĝeneralan homon sen ia distinga trajto. Ero de la amaso li sekvis la fluon de aliaj ordinaruloj. Viciĝas liaj tagoj aŭtomate kaj senevente en simpla vivmaniero.

Sed jen, griza mateno en lia 58-jaro. Senaverte implikiĝas lia vivfaden. Razante sin Grondel subite haltigas la manon, frapita de trista fakto: li maljuniĝas. Ĝis tiu momento ĉiuj ŝanĝetoj nerimarkite ariĝis en la bildo de lia aspekto. De tago al tago oni ŝajne vidas la samon ĝis la spegulo fine ribelas. Aperas en vera portreto la spuroj de la tempo. Malkaŝe parolas la signoj. Kruda fakto. Senkomparte la spegulo altrudas la realecon. Sulketoj okupas la frunton, la krania volbo heletas sub fuĝanta hararo. La staturo jam kliniĝas.

Li rigardas kaj komprenas la signalojn. Ŝokita li vekigi el sia inerta tagrutino kaj konstatas, ke la tempo atakas lin, ke la vivo fortrenas lin el sia centro. Li vidas sin falinto en la maron, kies boato forvelas sola. Kun distra peno li finiĝas la razadon kaj en robota maniero preparas sin por sia taglaboro aktuala.

Ne postulante seriozan atenton la plankopolurado bone konvenas por samtempa pensovaga distrumo. Kelktage li nur dise meditas pri la ĵustro-vita ĉagreno, sed iom post iom rekonas ĝian gravecon kaj ĉiutage spertas la ĉeeston de reala problemo. Kie nun la senĝena libereco de antaŭe? Matene la spegulo ne plu kaŝludas. Dum la laboro la glatbrila planko spegulas lin. Ripete la cirkonstancoj aludas pri lia maljuniĝo. Ne eblas forkuri de si mem. Li sentas sin kaptito, kaptito de sia propra vivo. La embaraso katenas lin kaj eĉ ne por momento permesas al li pensi pri io ajn alia. En sia ĝisa vivo Grondel ĉiam alfrontis la problemojn de la pasanta rutino per reago de praktika neceso, sed nun li staras en tute fremda situacio. Kiel due-li kun tia antagonisto, la maljuniĝo, la tempo? Kiel defendi sin? Senkonsila, sen metodo kaj armilo, nekapabla por

tiu nova speco de mensa laboro li emas konfuziĝi. Trankvile li ĉiam vegetadis en nerompita kutimeco. Neniu ekstera afero aŭ ideo iam okupis lin por elvoki iaspecan intelektan forton. Nenio alia havis sufiĉe longan brakon por ĝeni lian atenton en libera tempo. Lia fizika laboro kaj ĝia sfero limigis lian mondon kaj prezentis al li fortikaĵon kontraŭ la komplikeco de la cetera vivo.

Unu sola afero plenigis la kroman tempon de Grondel kaj tute kaptis lin, ĉar ĝi animigis lian funkciadon de plankopuluristo. De la komenco li notis sian ĉiutagan enspezon sed en la daŭro vastigis la notadon tiom, ke ĝi fine ampleksis ĉiun ajn cirkonstancan parencon al lia okupo. Daton, tempon, nomon kaj adreson de mendinto, en kiu etaĵo la loĝejo, ĉu solulo, paro aŭ familio. Nombro de infanoj, tapetan koloron, ĉu hundo aŭ kato. Preskaŭ manie li serĉis noteblan detalon kaj plenigis libron post libro, sistemigis ĉion statistike, desegnis diagramojn, starigis tabelojn. Okazis iam, ke li leviĝis nokte por kontroli, ĉu li ion forgesis. Senpripense li oferis pli da celkonscia energio al la kompletigo de sia notado ol al la ĉeflaboro mem.

Sed nun ĉio renversiĝis pro la alarmiga enmiksiĝo de la spegulo. Dorne pikis kaj turmentadis lin tiu abomena afero pri la maljuniĝo kaj li decide rifuzis akcepti tiun ofendan maljuston de la sorto, tiun atencion kontraŭ lia propra personeco. Temas ja pri ŝtelo de lia plej intima propraĵo, lia korpo, lia memo. Ne eblas humile rezigni al la ĉiutaga regreso de korpo kaj animo. Grondel indignas ĝisfunde sed tiu lia persona malfeliĉo kovras ĉion per sia ombro, farigas la ĉefa temo de ĉiu minuto, cementiĝas en lia estado. Tage kaj nokte li serĉas rimedon por ataki kaj haltigi la evoluon. Kie savo? Ĝis nun neniu pioniro raportis spertojn el simila batalo. Necesas io eksterordinara por venki tian senindulgan potencon. Sed lia primitiva intelekto ne sukcesas elpensi ion ajn por efika rezisto. Pli kaj pli li sentas sin senhelpa viktimo de io neevitebla. En nerompebla sieĝo li perdas la esperon, lia menso kolapsas kaj cedas sian kampon al sensenca kolero. Furioze li ekkoleras kontraŭ la insida minaco. Vekiĝas emocio kaj sentoj tute nekonataj al li mem. Konstante bolas en li protesto. Kreskadas intensa malamo

kontraŭ lia detruanto kaj fariĝas ia memstara, ekstera forto en kiu lia blinda kolero generas rabian efikon, forto sen volo kaj intenco, naskita el ribela malamo kaj armita sole per natura inklinado por atako kaj venĝo en blinda destino. Jam ekagis postfronte tiu lia kunbatalanto dum Grondel senscia proksimas al freneziĝo. Sed la situacio nun emas al ŝanĝo kaj en ĝusta tempo li imagas rimarki ian diferenccon. Ŝajno aŭ imago, sed ĉu ne, tamen? Eklumas nuanco de pliboniĝo, ĉu fakte la afero nun haltos?

Ĉiutage li observas intense, hezitas, esperas, apenaŭ li kuraĝas kredi, sed fine li emas konstati fakton. Post longa, detala kontrolado kaj komparo li konvinkiĝas. Tutcerte, aperas signoj de pliboniĝo. Firmiĝas la stimula penso, ke la atako de disfalo ekcedas pro lia brulanta ribelado. Sen kompreni la miraklon li kuraĝe rigardas sian spegulbildon kaj tutfeliĉa certigas pri la ŝanĝo. Jam klare vidiĝas definitiva efiko. Li trovas sian aspekton pli freŝa, sentas sin pli vigla. Leviĝas espero ke li povus regajni ĉion perditan. Videble aperas signoj de juniĝo. Sendube turnas la vento. Triumfe li vidas sin jam venkonto kaj duafoje savita. Liberigita de timo kaj kolero li retrovas la trankvilan staton de la pasinto kaj unuafoje spertas plezuron pro la nura fakto ke li vivas. Sed atentu, Grondel! Neniu periodo de la vivo konas sekurecon. Preparas sin alia surprizo.

Embuskas la sorto, turnas sin kaj atakas el mala direkto. Anstataŭ stabiliĝi kaj resti en flora normaleco lia rejuniĝo ne haltigas. Okazas ia mistera elreliĝo de naturo kaj tempo. Ĉu la spegulo konsterniĝis? De tago al tago ĝi montras al li konstante pli junan vizaĝon. Komence tio rave kontentigas lin, sed baldaŭ li ekmiras, ne komprenas, ne rekonas sin mem. Li vidas sin en frutempa apero. La hararo pli densa brilas kun viva koloro. Radias la okuloj, rozas juneco.

Kaj daŭras same sur la nova vojo. Konstante en pli fruan junecon. Neniu restas de la aĉa plenkreskulo. La tempo rabas jarojn. Terurita Grondel rekonas la kruelan veron de sia nova realeco. Lia feliĉo rapide ŝanĝiĝis en dramon. Senkonscie li mem liveris sin en la manojn de iu katastrofema demonpotenco. Sensave li vidas sin destinata al neniĝo, al la timige mistera

Alvokas Inja

Sur la kontrolpanelo de spacoŝipo AZI-20 briletas en funkcia grupigo 38 ciferoj en palverda, teknike senviva lumo. Atente gardas ilin la okulparo de astronauto Amil Sander dum sekvas la veturilo sian direkton al fora celo.

Li proksimiĝas al la ekstrema punkto de sia esplora komisiono, trisemajna distanco for de la ĉefa spacostacio. Laŭplane ĉio progresas en teknika perfekteco. Plurspeca observado plenigas la tagojn kaj ne permesas tedan momenton. Krome Sander pasias por sia profesio. Grandan parton de sia vivo li pasigis en la spaco kaj senĉese incitas lin la aktuala situacio longe trovi sin tiom fore de la Tero kaj pli proksime al la kampoj de l'Aventuro. Altgrade kompetenta fakulo, Sander, sed ankaŭ iom de filozofo kaj homo de serioza karaktero. Vaste li veturas ankaŭ en la spirita regiono, ĉar li hejmas en ambaŭ mondoj.

Ĝis tiam ne ofte okazis al li ke iu indico ĝenis aŭ malhelpis en esplora kampanjo, sed ĉi-foje escepto mirige surprizas lin. La pinto de pingloforma montrilo moviĝas du gradojn el pozicio. Alarmiga fakto – la pinglito informas, ke la veturilo ne plu sekvas donitan direkton. Sammomente aperas la diferenco sur la komputila ekrano. Apenaŭ kredinda afero, ĉu bagatelo aŭ problemo, sed la indikoj restas. Sander kontrolas ĉion kaj teorie persekutas diversajn ideojn pri eventuala kaŭzo sed trovas nenion. La eraro obstinas, spitas korektigon kaj restas sekreta. Post duonhoron tamen konstatiĝas variado, holografia bildo

montras etan, sed konstantan kurbiĝon de la direkto. Turnadas dekstren. Cetere neniu funkcio strikas, nur daŭras la stranga ĝeno, jam iel difinita: ne eblas transiri iun kurban linion maldekstre.

Kontaktas nun la terobazita Teknika Centro al kiu la esplora veturilo konstante komunikas per si mem la funkciadon kaj ĉiun ajn cirkonstancan. Senrezulte oni debatas la strangajn kaj fine interkonsentas, ke la ekspertoj traktu la problemon por poste liveri sian opinion. Post kvaronhoron alvenas responde ilia provizora komando: – Sekvu la baran linion dum du horoj en plejebla proksimeco por ke ni kontrolu eventualan kurbiĝon. Sander daŭrigas la veturon en preciza reguleco sen nova diversiĝo. TC raportas: – Nia kalkulo indikas cirkon, kies periferio postulas de vi ankoraŭ 90-minutan iradon ĝis vi revenos al la punkto de la ŝanĝo. Dume ni elpensos la postan taktikon.

Al iu ajn astronauto la nova fazo de la veturo ŝajnus teda interrompo, sed la sciemo de Sander kontinue viglas kaj iom post iom li provas formi propran teorion dum la Teknika Centro klopodas atingi ian solvon. Sed ankoraŭ la manko de indikoj ombriĝas la aferon. Ambaŭflanke la ekscito obliĝas.

Reveninte al sia elirpunkto Sander trovas ke li trairis kompletan cirkon. Nova komando: – Necesas dua provo, faru nun transversan turnon, 90-grade de via nuna irado. Sekvu kontakte kun la baro ĝis vi eble retrovos vian nunan pozicion. Tio donus gravan informon. Rezultas nun rondiro, ĉi-foje one malpli longa ol la unua. Tio aludas pri iu nekredibla formo. Sekvas nun longa serio de ĉiufanka provado en sama maniero, mezurado, kalkulo, kombinado. El tiu provo aperas nun sensacia konkludo: Sander trovas, ke li renkontis ion ne nur nekontan sed laŭ scienca koncepto tute nekrediblan. La indikoj kaŭzas konsterniĝon. Regas konfuzo en la Teknika Centro, sed scienco rilatas al realeco kaj oni devas akcepti kaj serioze trakti ĉiun faktan aperaĵon sen antaŭjuĝo. Oni alfrontas la defion, atakas la problemon el ĉiu pensebla vidpunkto, sed devas baldaŭ konstati, ke oni staras senpova antaŭ iu fenomeno de neimagebla speco. La longa penado finiĝas nur en imago pri iu korpeca, nesolida formiĝo kun diametro egala al tiu de granda planedo.

Ĝisnuna intensa esploro ne permesas difinon aŭ klaran priskribon, montras nur, ke ŝajnas aperi giganta, dika ringaĵo de homogena natureco, verŝajne nemateria sed eble kun kvazaŭsubstanca karaktero. Surfaco ne konstatebla. Ne respondas al elektronradia serĉado. Nevidebla. Nenia speco de lumo. Fotografado sensukcesa. Evidente temas pri nura formiĝo de ekstreme forta energio.

La Centro nomas sian novan embarason Objekto NEMO kaj starigas specialan komitaton de supera fakkompetenta kombino. Oni komisiis al Sander resti ĉe la objekto por sistema observado kaj por fari raciajn eksperimentojn laŭ propra bontrovo kiel ajn la cirkonstancoj permesas. Tiu favora aranĝo tre plaĉas al Sander. Por la proksima tempo li havas plenan okupon kaj povas dediĉi ĉiun minuton al sia provado por mem proksimiĝi al la klarigo de la fenomeno, sciant ke li devas plenumi taskon indan al teamo de Diofantos, Newton kaj Einstein. Tamen lia peno ne tute vanas. Baldaŭ li konstatas per relatiĝo al la moviĝo de la steloj, ke la objekto ne orbitas kiel planedo sed restas surloke kiel domo sur sia grundo. Tiam frapas lin kapturiga ideo: tiu fakto, ke la objekto restas en firma pozicio devas indiki sensacian aferon: Li trovas sin en la mezo de la Kosmo – li trovis ĝian centron! Saluton al vi, ĉiuj gravuloj de la pasinto, kiel vi fartas nun? Vekiĝu kaj diru vian opinion: Se vi povas superi tion-ĉi per aso atuta – jetu ĝin sur mian tablon!

Sekundo nur de fantazia konfuzo. Sander preferas resti en sobra stato kaj senhezite forĉasas la ideon. Jam sufiĉas la embaraso kaj li planfidele kaj sisteme provas ankoraŭ profitigi sian persistan agadon palpante en ĉiun direkton per sia spacoŝipo por trovi la precizan limigon de Objekto NEMO. Parte li sukcesas, konvinkiĝas pri la definitiva formo kaj amplekso de la stranga "io", sed surfacon li nenie trovas kaj nenie povas surgrundiĝi kun sia veturilo. Eblas proksimiĝi ĝis certa distanco, sed en tiu punkto ĉie li renkontas forpuŝan forton, kreskanta des pli li obstinas venki ĝin. Post serio da provoj irante plurloke en unu direkton kaj returnante malen sen flankiĝi li konstatas per diferencoj en sia propra rapideco, ke la objekto sen ia dubo turniĝas dumaniere en firma reguleco; la granda ringo rotacias ĉirkaŭ sia centro planedosimile, sed samtempe volviĝas ĉirkaŭ sia

Daŭrigo de la antaŭa paĝo:

stato de inteco. Atendas lin nekonata fino, pli nigra ol la morto. Purgatorie li devas travivi returne sian tutan vivofluon kaj turmentas lin senĉese la anticipa scio pri la enhavo de ĉiu alvenonta tago. Senkompatate la tempo trenas lin malantaŭen. Li perdas ĉion lernitan, forviŝiĝas la memoro. Lia interno baldaŭ similas al rikoltita kampo sen ĉielo kaj horizonto. Forvagas lia animo en senkonscia nebuleco. Mortas la individua unueco dum io senpersone duonviva trafluas inkuban vizion en senespera perdiĝo. En longa falo tra samtempe unua kaj lasta vivofazo finiĝas afero Grondel, senspura kiel morto de vento.

Stig Jacobson

"horizontala", ringoronda akso en sinkrona movado sen foriĝi el sia pozicio.

La strangeco de la fenomeno katenas lin kaj tute absorbas lian pensadon. Ĝia natureco, ĝia funkciado kaj senco, la surloka restado, kion ĉio signifas? Revenas al li la ideo pri la universa centro. Ĉu tamen fantazio nur? Ie devus esti mezo, kaj se ĝuste ĉi-tie, li vere trafis per rekorda hazardo! Ĉu ne tio-ĉi devus esti spuro de la Granda Eksplozo, ĝia preciza loko, la Komencejo? Ĉu superfizika cikatro post la katastrofa naskiĝo? Ĉu la malo de Nigra Truo, la tombo de l'materio? Se jes, li fakte trovis sin ĉe la rando de la Blanka Fonto, la provizejo de la tutmonda energio, la akuŝejo de ĉio materia.

Ŝajnas nun al Sander, ke ankaŭ la aktuala situacio haltas, fariĝas statika en mondo sen evoluo kaj celo. Lia

penso same kiel lia veturilo atingis netransireblan limon. Por li la senco de la scienca programo ŝanceliĝas kaj cedas al lia persona implikiĝo. Intuicio kaj sentoj vualigas lian pensadon, fine anstataŭas ĝin kaj iel intimigas lin kun la problemoj, ĝis li kredas sin sperti ian ekstervolan interagadon kun la Objekto. Iel ŝajnas, ke li kontaktas kun io individue viveca, dotita per iu speco de vivo pli kvalita ol nura funkciado. Ŝajnas, ke manifestiĝas en lia proksimeco iu fremda volo, kies intencoj li ne komprenas. Kvazaŭ telepatie altrudas sin konstante iu sugestema emanado, mistere indiferenta pri bono aŭ malo sed kun celaktiva, intensa forto.

Sander seninterrompe sentas la instigon de la Objekto kaj paŝon post paŝo subiĝas al ĝia potenco. Ne plu li atentigas la komunikadon kun la Teknika Centro, sed anstataŭe pli kaj pli

turniĝas internen kaj permesas al sia pensado forvagi en senkontrola revado pri nebulaj temoj, sen rimarki la ŝanĝon kaj malfortiĝon de sia menso. Gradete li perdas agemon, ĝis li fariĝas nur inerta pasaĝero, senmova, transportata ŝarĝo, sen rimarki, ke la defenda forto de l'Objekto eroziigas ankaŭ lian veturilon.

Spite al la rigora malpermeso de privata komunikado lia filineto Inja per la serĉo-aŭtomatiko hazarde sukcesas atingi kontakton kun sia patro en la spacoŝipo AZI-20, jam viktimo de la spaca mistero. Senforta, apenaŭ konscia Sander perceptas ekflagron de lumo sur la komputila ekrano. Palombre aperas la vizaĝo de Inja kaj flustre aŭdiĝas ŝia voĉo: — Revenu hejmen, Paĉjo. Printempas nun, hieraŭ mi trovis anemonon.

Stig Jacobson

POEZIO

Riĉeco

Mia valora posedaĵo
ne letargias en ŝtala sekurejo
de svisa bankpalaco
sed ĉiutage servas
en mia proksimo
pagante al mi malavaran renton.
La kontolibro
nomas la trezorojn:
Lito,
tegmento
kaj pordo por gardi la dormon.

La spiko

Tritika spiko.
Reguleca, harmonia formo.
Arte bilancita kvanto.
Dormanta vivpotenco.
Senfina fonto de riĉeco.
Memoru la fablon:
Unu grajno sur la unua kvadrato
de la ŝaktabulo,
poste duobligo ĝis la lasta.
Neimagebla amaso.

Se vi tenas spikon en via mano
vi egalas al kreanto
en posedo de supera forto,
multobliganto de mondoj.

Diferenco de samo

Eksplodo aŭ fulmo.
Momentona malcentriĝo
de maksimuma energio.
Iom daŭras nur la tondro
rulante for.

Rapidegas ĝia lumo.
Disiĝas en kupola volbo
aŭ forkuras sammomente
en mejlolonga sago.
Urgema detruo.

Falas kerno,
ĝermas,
radikiĝas,
evoluas organe,
kreskadas kontinue
kaj prezentas fine
pomarbon.

Jen ankaŭ eksplodo.
Agis sama forto
sed en letargia trakvileco.
Sampaŝe
kun pacienca tempo
ĝi sisteme malrapidis
por servi en kreado.

Stig Jacobson

Arne, la ĉefido

Arne, la ĉefido estas romano por 8-15-jaruloj, verkita en la sveda, kaj tradukita Esperanten de la aŭtoro. La okazaĵoj okazas en frua vikinga tempo, aŭtune en la jaro 829. Jen vi povos legi la du komencajn ĉapitrojn.

Unua ĉapitro

"Björn starigis la ŝtonon memore al Arne, sia patro. Li manĝigis la aglon en Kurlando."

Arne fieris. Finfine li sciis legi la ruĵojn sen heziti. Li estis la ununura knabo en la vilaĝo, kiu sciis legi ruĵojn. Nek lia frateto Egil nek lia pli aĝa fratino Ylva volis lerni la arton. Eble estis, ĉar lia nomo estis ĉizita sur la ŝtono. Arne li nomiĝis. Kiam li preterpasis la runŝtonon, kiu staris apud la pado inter la vilaĝo kaj la maro, liaj fingroj ofte sekvis la ĉizaĵojn, kiuj montris lian nomon: A—r—n—e. Jam antaŭ ol li lernis legi, li sciis kie la nomo estas ĉizita. Li sciis ankaŭ ke tiu Arne, kiu estas menciita sur la ŝtono ne estas li, sed lia avo.

Du jarojn antaŭ lia naskiĝo, lia patro Björn vojaĝis kun la ŝipoj kune kun sia patro Arne kaj kun multaj aliaj viroj el la propra kaj najbaraj vilaĝoj. Ili velis trans la orienta maro kaj sur multaj riveroj. Ili eĉ devis treni siajn ŝipojn sur ruliĝantaj trunkoj je longaj distancoj trans la tero antaŭ ol atingi Kurlandon. Tie ili povis vendi sian ledon kaj povis aĉeti ŝtofon, perlojn kaj multajn aliajn belajn objektojn. Post longa tempo la ŝipoj revenis al la vilaĝo. Tiun tagon la ĝojo estis granda inter la vilaĝanoj, kiuj revidis filojn, edzojn kaj patrojn. Same granda la malĝojo estis inter tiuj, kiuj eksciis, ke la atendataj viroj mortis en batalo. Unu el tiuj, kiuj mortis, kiam la ŝipoj estis atakitaj de piratoj estis Maljuna Arne, la avo de Juna Arne. Tial Björn starigis runŝtonon memore al sia patro, kaj tial la unua filo de Björn estis nomita Arne. Kiam Arne estis malgranda, Ragnhild — lia avino — kutimis premi Arne al sia sino rakontante pri lia avo. Certe ŝi malĝojis pri la morto de sia edzo, sed estis afero, kiu ŝajnis maltrankviligi ŝin eĉ pli multe. Ŝia dua filo, Ulf, la frateto de Björn, malaperis dum la vojaĝo al Kurlando, kaj neniu sciis kien. Avino neniam ĉesis esperi, ke li revenos.

— Ne staru tie revante ĉe la runŝ-

tono, ho Arne! Venu! Nun io aparta okazos.

Vokis lin Gunnar. Gunnar estis same aĝa kiel Arne. Ili kune lernis pafi sagojn per arko. Ili ankaŭ kune ekzercis ĵeti lancon al putrinta arbostumpo, kiu staris ĉe arbarrando je la alia flanko de la paŝtejo, kie la bovinoj kaj ĉevaloj kutimis paŝtiĝi. Neniam estis tede esti kun Gunnar. Li ĉiam eltrovadis diversajn amuzajn ludojn, sed tiun ĉi fojon Gunnar aspektis eĉ pli entuziasma ol li kutimis esti.

— Kio okazis? kriis Arne.

— Iu el la knabinoj vidis alkojn apud Grandmonto, kaj nun multaj el la viroj jam estas survoje, respondis Gunnar. Ni ĉasos. Poste ni manĝos viandon dum tuta semajno. Venu, ni kuru.

Arne sciis, ke ne plaĉas al ĉiuj viroj, ke knabetoj alvenas, kiam la viroj ĉasas. Ne estas permesite alveni al granda ĉasado, sed tiun ĉi fojon alkoj estis tuj ekster la vilaĝo. Grandmonto situis nur iomete malantaŭ Ogrolago. Nun oni devas kuri rapide por ion vidi.

— Mi venos, respondis Arne kaj komencis kuri kiel eble plej rapide.

Ekster la domaro staris kelkaj ridantaj knabinoj.

— Jen kuras Arne, diris Ylva. Li kuras same rapide kiel la alkoj, kiam ili ekvidis la ĉasistojn.

— Ŝajnas, ke nur Gunnar povas veki Arne, kiam li revas apud la runŝtono, diris Ingeborg. Se Gunnar vokas "venu", li venas. Ĉiam!

Ridetiĝis ambaŭ knabinoj. Iomete for de la knabinoj staris ankaŭ iu alia. Estis maldika knabo kun malhelaj haroj kaj brunaj okuloj. Oni kutimis nomi lin Trumbe, sed neniu fakte sciis lian veran nomon. Li scivoleme rigardis, kiam Arne kaj Gunnar rapidis al la arbarrando, sed li ne montris emon sekvi ilin. Anstataŭ tio li daŭrigis kunligi fojnjon en garbojn. Kiam kelkaj garboj estis pretaj, li portis ilin al unu el la domoj, kiu havos novan tegmenton. La tegmentoj, kiuj estis faritaj el fojno, devis esti regule ŝanĝitaj. Nun estis la vico de la tria domo. La viroj jam komencis surmeti la novan tegmenton, sed nun ĉiuj krom du maljunuloj devos partopreni la ĉasadon.

Nun Arne atingis Gunnar. Gunnar ĉiam eltrovis la plej bonajn ludojn, sed Arne povis kuri pli rapide. Ili jam preterkuris la paŝtejon kaj apud la lanca arbostumpo ili prenis siajn lignajn lancojn, kiuj kuŝis tie post kiam

ili la pasintan fojon ĵetadis. La lancoj ne havis verajn pintojn, sed tamen estis ĝojige ĵeti ilin. Oni povis ja klare vidi, kiu trafis la arbostumpon, kaj kiu maltrafis. Arne sentis, ke lia koro batis ĉiam malpli trankvile. Ĉu estis pro la streĉiĝo partopreni veran ĉasaventuron kune kun Gunnar kaj la viroj, aŭ ĉu estis ĉar li kaj Gunnar kuris tiel rapide kiel ili povis?

— Atendu Arne, spiregis Gunnar. Ĉu vi frenezas?! Ni devas kuri dekstren.

— Ja mi scias, respondis Arne.

Kompreneble Arne sciis, ke oni ne povas kuri laŭ la bordo de Ogrolago. Tie apud la lago ja estas kaptofoso. Se oni proksimiĝas al la kaptofoso de la laga flanko la alkoj eble timos kaj kuros flanken, tiel ke la ĉaso fiaskos. Arne ne kuraĝis pensi, kion dirus la viroj se li kaj Gunnar fortimigus la alkojn. Ne, unue oni devas kuri je la dekstra flanko de la monto, kaj poste al la pinto. Tie, kie oni havas vidaĵon kaj de la vilaĝo kaj de la golfeto, la viroj kaj hundoj tute silente proksimiĝos al la alkoj. Kiam ili alvenis kiel eble plej proksime, ili kriis kaj vokos, tiel ke la alkoj timegos kaj fuĝos malsupren sur la monto. Samtempe ili instigos la hundojn kontraŭ la alkoj. La lancojn ili devos ĵeti nur se iu el la alkoj klopodos fuĝi al iu el la flankoj. La fuĝantaj bestoj kuros ĉiam pli rapide malsupren sur la deklivo. Fine ili klopodos iri inter la ŝtonegoj malsupre de la deklivo. En la pasejo inter la ŝtonegoj estis du grandaj fosajoj, kovritaj de branĉetoj. Tie almenaŭ iuj el la alkoj falos en la fosojn kaj ĝismorte trapikiĝos pro la akraj pinostangoj, kiuj elstaras el la fundoj de la fosoj, ne tiel alte, ke ili estas videblaj tra la branĉetoj, sed sufiĉe alte por ke la alkoj ne havu eblecon fuĝi.

— Ho! spiregis Gunnar. Ĉu vi ion vidas?

Arne same anhelis kiel Gunnar kaj preskaŭ ne povis paroli. Li ankaŭ ne devis ion diri, ĉar baldaŭ aŭdiĝis sovaĝaj krioj desupre sur la monto.

— Aaa! Aj, aj, aj, aj, aj, aj!

— Tute ne utilas kuri malantaŭ la monton, diris Gunnar. Venu!

La viroj jam komencis peli la alkojn de sur la monto. Gunnar kaj Arne komencis kuri malpli rapide kaj klopodis esti kiel eble plej silentaj. Se ili proksimiĝos al la deklivo de la flanko, ili eble povos vidi kiel iu el la alkoj falos en kaptofoson.

— Vi domaĝu la postajojn, ĉu ne? ridetiĝis Arne.

Gunnar nenion diris, sed ridis des pli multe. Li sciis ekzakte pri kio aludis Arne. Iam Arne kaj Gunnar kutimis sidi fiŝkaptante ĉe la maro. Alifoj je ili kutimis paŝti la brutojn kune kun Trumbe, kiam la bovinoj povis paŝtiĝi ĉirkaŭ marĉejoj en la arbaro, kie estis sukoplenaj herboj, kiujn amis la bovinoj. Tiam ili kutimis rakonti anekdotojn. Iu el tiuj temis pri viro el naj-

bara vilaĝo. Iam li estis en la arbaro kaj falis rekten en kaptofoson kaj la akra pinostango trafis lin rekte sur la postajon. Gunnar, Arne kaj Trumbe kutimis ridi tiom, ke ili preskaŭ sufokiĝis, kiam ili pensis kiel dolorus se la pinostango trafus onin en la postajon. Iam ili ridis tiel multe, ke vere doloris la ventro, sed ne tiel multe kiel dolorus se la pinostango trafus la postajon. Post la ridado, Arne ĉiam miris, ke oni ridas pri afero, kiu estas tiel terura. Eble, ĉar estas tiel terure, ke ne helpas plori pri ĝi.

Fine ili alvenis al la framboarbus-taro. Estis la plej bona frambejo de la mondo. Sur la ŝtona deklivo de Grandmonto la framboarbustoj kreskis dense. Kontraŭe estis nur malmulte da grandaj arboj tie ĉi. Ĝuste tial la alkoj kuros preter tiu ĉi loko, kaj de tie ĉi oni havos bonan vidaĵon de la kaptofosoj.

Subite tri bestoj krake kuris ĝuste antaŭ Arne: unu granda kaj du malgrandaj alkoj. Devas esti alkino kaj du alkidoj, pensis Arne.

— Ili estas freneze grandaj, flustris Gunnar.

Fakte ne estis kialo flustri, ĉar la alkoj jam timis kaj Arne kaj Gunnar nun staris super ili, sed eble pro la grandeco de la bestoj oni volis paroli mallaŭte.

— Mi neniam estis tiel proksime al granda alko, diris Arne.

— Nek mi, diris Gunnar.

Nun aŭdiĝis mallonga sed intensa bleko de sub la monto. La alkino falegis en kaptofoson kaj trapikiĝis per la pinostango. La knaboj kuregis malsupren kaj baldaŭ vidis tion, kio okazis. La alkino kuŝis senviva en la foson. En la foson falis ankaŭ unu el la alkidoj, sed ĝi ne vundiĝis pro la stango, sed baraktis apud la alkino. Oni vidis eĉ ne spuron de la alia alkido.

— Ni sekvu la alian alkidon. La viroj zorgu pri la alkoj en la foson, diris Gunnar. Venu, ho Arne!

La knaboj kuris preter la kaptofoson, tuj apud la rando kaj ĉirkaŭrigardis. Tie, apud la lago staris la alia alkido. Arne kaj Gunnar ekkuris al la strando. Subite malaperis la tero sub la piedoj de Arne. Li falis senhelpe kaj surteriĝis sur la fundo en foson.

— Aj!

— Ĉu vi vundiĝis? demandis Gunnar.

— Aj, aj, aj!

— Kio pri vi?

Arne sidigis. La nazo doloris kaj terura doloro estis en la dekstra brako, sed eĉ pli multe li hontis. Li falis rekten en kaptofoson. Kiel li povis esti tiel stulta, ke li postkuras alkidon kaj tute forgesas, ke estas plenplene da kaptofosoj inter la monto kaj la lago? Li hontis.

— Estas bone! Tamen sufiĉe bone, diris Arne. Doloras al mi la brako, sed cetere estas bone. Mi kredas, ke mia nazo batiĝis kontraŭ la pinostango.

Povus esti vera malprospero por mi.

Arne komencis grimpi el la foson. Estas pli facile por homo grimpi el foson ol por alko.

— Vi elturniĝis, diris Gunnar terurita. Sangas via nazo. Atendu, mi forviŝos la sangon. Gunnar prenis kelkajn flaviĝintajn betulfoliojn de apuda betulo kaj viŝis la nazon de Arne.

— Dankon, diris Arne. La brako ne plu same multe doloras. Mi savis ankaŭ la postajon.

— Jes, vi savis ĝin, diris Gunnar ridetante.

— Ho Gunnar . . .

— Jes.

— Bonvolu nenion diri al patro kaj al la aliaj viroj pri tio ĉi. Se vi dirus, nur post tempego ni povos partopreni la ĉasadon.

— Bone, mi nenion diros. Mi promesas.

— Dankon.

Arne frotis la plejmulton de la malpuro for de la vestaĵoj. La knaboj komencis reiri al la kaptofoson. Tie la viroj jam kolektiĝis. La alkino estis mortigita pro la pinostango. La alkidon ili mortigis per lancoj. La hundoj bojis kaj ĉiuj ĝojis pro la hodiaŭa ĉaso. Nun estos festeno, sed antaŭ tio estos multe da laboro. Oni senhauĝigos la bestegojn kaj dispecigos la viandon. Ĉion oni portos al la vilaĝo. Tie oni rostos iom sur la fajro por la vespera festeno, sed ankaŭ restos ŝparebla viando. Iom oni sekigos. Aliajn pecojn oni fumaĵos. Tiel oni povos konservi la viandon, tiel ke oni povos manĝi de ĝi dum la alproksimiĝanta vintro.

— Arne kaj Gunnar! ĝoje diris Björn. Vi bonŝance povis partopreni veran ĉason. Ĉio tiel rapide okazis. Kuru al la vilaĝo kaj diru al la virinoj ke ili faru fajregon. Ni rostos kaj fumaĵos la viandon. Sendu la sklavojn tien ĉi tiel ke ili helpu porti.

Kiam Björn parolis unu el la viroj jam grimpis en la foson kaj komencis tranĉi la ventron de la alkino.

— Jes, ho patro, tion ni faros, diris Arne.

Ili komencis kuri al la vilaĝo. Arne fakte ĝojis, ke li ne devis partopreni la alkobuĉadon. Li ne povis diri kial, sed li opiniis, ke buĉado iel estas malagrabla. En la bieno li plurfoje partoprenis kiam oni buĉis porkojn, ŝafojn kaj ŝafidojn. Kutime estis la tasko de la infanoj kirli en la granda bovlo, kiam la sango de la buĉita besto estas verŝata de la koltranĉo. La sangon oni povis uzi por sangokolbasoj aŭ sango-pano, sed ĝi ne koaguliĝu tuj. Tial oni kirli ĝin. Ĉu oni ŝparas ankaŭ alkan sangon? Tion Arne ne sciis, sed li ankaŭ ne demandis. Kune kun Gunnar li komencis kuri al la vilaĝo.

Dua ĉapitro

Kiam Arne vekigis, la suno jam staris alte sur la ĉielo. Tio ne estis stranga. La festeno daŭris longe. Predo da du alkoj estis bona kialo por festeno, kaj festeno devas okazi tuj, kiam estas kialo festeni. Ĝi estas bonvena interrompo inter la multaj tagoj, kiuj estis tiel similaj unuj al la aliaj. Arne stariĝis el sia kuŝejo en la domo. La kuŝejo estis mola kaj komforta: tavolo da fojno kun feloj supre. Tie oni povis dormi komforte. Vintre oni alportis pli da feloj. Sub ilin oni povos kuŝiĝi, kiam malvarmiĝos, kaj oni ankaŭ povos kuŝiĝi pli proksime al la aliaj, kiuj dormos apude, sed ankoraŭ ne estis vintro. La aŭtuna sunbrilo likiĝis tra kelkaj fendoj en la tegmento kaj ankaŭ tra la fenestro, la aperturo en la domomuro, kiun oni povos fermi per haŭto, kiam venos la vintro. Arne stariĝis. Estis multe da loko en la domo. Ĝi ne estis simpla kabano, en kia kutimas loĝi malriĉuloj. Ne, la domo estis altplafona. En la mezo estis la loko de la ĉefo. Apud li la viroj kutimis sidi. Plej fore estis la loko de la virinoj kaj la infanoj kaj ĉe la alia fino, malantaŭ ligna muro, kutimis dormi la ĉevaloj, kiam estis malvarme en la vintro. Dum la somero la bestoj kutimis dormi ekstere, krom en la tagoj kiam la kuljoj turmentis ilin. En la vilaĝo estis ankaŭ aliaj domoj, en kiuj loĝis aliaj homoj.

Arne eliris tra la pordo. Ĝi estis iom malalta. Kiam Arne eliris li ekpensis, ke li multe kreskis post la pasinta somero. En ĉiu jaro li proksimiĝis al la pordosupro. Nun li havis dek unu jarojn, kaj ne daŭros multajn jarojn, ĝis kiam li devos kliniĝi trapasante la pordon, same kiel faras patro Björn kaj multaj aliaj viroj. Estos interese ekscii, kiom alta li estos.

Ekstere sur la korto multaj el la aliaj infanoj jam ludis. La infanetoj ekdormis jam frue hieraŭ, kaj tial ili jam vigligis. Gunnar ie sidis parolante kun Ylva kaj Ingeborg. Kontraŭe malmultaj plenkreskuloj estis videblaj. Eble ili ankoraŭ dormis, aŭ almenaŭ ili estis tro lacaj por montri sin ekstere. Nur apud la paŝtejo kelkaj sklavinoj melkadis la bovinojn. Ili sciis, ke tio estas farenaĵo, sendepende ĉu oni estas laca aŭ ne.

— Ĉu vi vere nun vekigis, ridaĉis Gunnar. Ĉu vi laciĝis hieraŭ? Ĉu vi eble trovis sklavknabinojn, kun kiuj vi amindumis?

— Silentu! diris Arne.


Li bone sciis, ke la pli aĝaj knaboj venkis sian hontemon antaŭ knabinoj, klopodante ĉirkaŭbraki iun el la sklavknabinoj. Dum la festeno hieraŭ vespere Arne ankaŭ vidis du pli aĝajn knabojn, kiuj iris al la arbaro kun du sklavknabinoj, sed Arne malmulte pensis pri tio. Li mem ne emis fari ion tian. Estis multe pli amuze ludi kun la

knaboj, sed iam oni povas permesi al iu knabino kunludi, se ŝi ne diris ion ĝenan.

— Vi mem umu kun viaj sklavknabinoj, daŭrigis Arne. Venu, anstataŭe ni ĉasludu! La lancoj kuŝos ĉe la luda arbostumpo. Kiu alvenos la unua, havos la piklancon. Venu knabinoj, vi certe kuros pli rapide ol Gunnar. Li certe lacas post la vespero kun la sklavknabinoj.

Ingeborg kaj Ylva elkore ridis.

— Ni venas, diris Ingeborg. Ankaŭ ni partoprenos la ĉasadon. Mia avino estis lerta ĉasistino. Ŝi mem predis multajn alkojn, kiam la viroj forestis komercante. Tiam ni virinoj prizorgis ĉion en la bieno. Ŝi estis multe pli lerta ĉasistino ol la maljunuloj kaj kna-



Desegno: Kajsa kaj Karl Nordenstorm

betoj, kiuj restis en la vilaĝo kiam forestis la viroj. Mi estos kiel avino.

Ĉiuj kvar ekkuris preter la paŝtejo al la luda arbostumpo. La knaboj kuris pli rapide, sed ankaŭ la knabinoj kuris tiel rapide, kiel ili povis en siaj longaj roboj. Apud la paŝtejo sidis Trumbe, la sklavknabo. Nun li havis nenion por fari. Ordinare multaj homoj kutimis laborigi lin, sed hodiaŭ neniu zorgis pri tio.

— Venu, Trumbe, ĉu vi volas ludi kune kun ni? vokis Arne.

Trumbe ĝojmiene rigardis. Malofte la liberaj infanoj kutimis demandi, ĉu li volas partopreni, sed tio tamen okazis. Tamen multaj plenkreskuloj ne ŝatis, ke la liberaj infanoj ludas kun sklavoj, sed la vilaĝo estis malgranda, kaj ne estis multaj infanoj, kun kiuj oni povus ludi, kaj tial decidis ke ili ludas unu kun la aliaj dum ili estas infanoj.

— Sed Arne, diris Ylva ektiminta, vi ja scias ke sklavoj ne rajtas uzi armilojn, eĉ ne lude.

Ankaŭ Gunnar kaj Ingeborg mal-

ŝate rigardis Arne. Ili ne komprenis, kiel li kuraĝas malatenti unu el la plej gravaj leĝoj de la vilaĝo, leĝon, kiun neniu iam ajn rajtas malobei: Sklavo neniam rajtas uzi armilojn.

— Ĉu vi frenezas? diris Gunnar. Ĉu vi malobeos la leĝon nur ĉar neniu el la viroj estas tie ĉi? Diru ne!

— Trankviliĝu, diris Arne. Mi ekhavis ideon. Venu, Trumbe, vi ludos kune. Ne maltrankviliĝu.

Trumbe aspektis timigita, sed samtempe kontentega. Ĉu li rajtos partopreni la ludon ĉe la lanca arbostumpo?

Tio estis unu el liaj sekretaj revoj: ludi kun la aliaj infanoj ĉe la lanca arbostumpo. Ĝis nun li nur ekzercis lancojetadon sekrete, kiam li certis ke neniu rigardos.

Nun kvin infanoj kuris al la arbostumpo. Trumbe fakte povus kuri pli rapide ol la aliaj, sed ne decus, ke sklavo kurus rapide. Li elektis veni la lasta al la arbostumpo. Tiam Ylva jam prenis la piklancon, kaj Arne, Gunnar kaj Ingeborg ricevis po unu ĵetlancon. Ne estis veraj armiloj, nur ludarmiloj, sed tamen estos ekscite.

— Trumbe estas alko, diris Arne ridante.

Trumbe aspektis surprizita, sed la ceteraj tri ridis pri la mirinda propono de Arne.

— Trumbe estas alko, diris Gunnar. Trumbe estas alko! Nun estos alkoĉaso.

Li ĵetis sian lancon al unu femuro de Trumbe.

— Aj, kriis Trumbe. Doloras. Ĉesu! Ĉu mi ne rajtos ludi kune kun vi hodiaŭ?

— Vi ja jam ludas, ridis Ylva. La alko estas vi, ŝi diris kaj puŝetis per la piklanco en la bruna hararo de Trumbe.

— Aaa, aj, aj, aj, kriis Arne. Aj, aj, aj!

La aj de Arne signifis ion alian ol la aj de Trumbe. La aj de Arne estis la aj de la pelantoj, kiam ili pelis la alkojn malsupren de la monta deklivo. Trumbe rigardis Arne kun teruro. Arne estis tiu el la liberaj knaboj, kiun Trumbe iam imagis esti vera amiko, sed li ja devus kompreni: Sklavo ne povas havi liberajn amikojn.

— Aaa, aj, aj, aj, daŭrigis Gunnar!

Li prenis sian lancon kaj ĵetis ĝin ankoraŭ unu fojon kontraŭ Trumbe, sed nun per multe pli da forto ol la unuan fojon. Ĝi trafis la dorson de Trumbe. La sklavknabo ĝemis kaj komencis rekuri al la vilaĝo, sed la lanco de Ingeborg trafis lin.

— Mi similas al avino, ĝojkriis Ingeborg.

Trumbe ŝanceliĝis kaj stumblis sur la lanco de Ingeborg. Post momento ĉiuj infanoj superregis lin.

— Ni havas lin, kriis Arne, kaj sidigis diskrure sur la ventro de Trumbe. Ingeborg reprenis sian lancon kaj direktis la lancopinton al la nazo de la plorsingultanta sklavknabo kaj Ylva

direktis la piklancon kontraŭ lia koro.

— Ĉesu, plorsingultis Trumbe. Mi ne estas alko. Vi ja scias tion. Lasu min.

— Kia stranga alko parolanta, diris Gunnar, sed alko estas alko. Nun estos festeno en la vilaĝo, sed unue ni devas buĉi ĝin.

La knabinoj kaj Arne ridis pro la inventemo de Gunnar.

— Nun komenciĝos la buĉado, daŭrigis Gunnar. Unue ni senhaŭtigos la alkon, li daŭrigis kaj ekkaptis la eluzitan pantalonon de Trumbe, kiu iam apartenis la Arne, sed kiun heredis Trumbe, kiam oni ne plu povis ripari ĝin.

— Ne, ne, kriis Trumbe kaj komencis turniĝi kiel serpento, por liberiĝi el la preno de Arne. Li plorsingultis spasmе kaj ĝemis.

— La alkon ni senhaŭtigos, ripetis Gunnar kaj forte prenis la randon de la pantalone kaj tiris ĝin ĝis la genuoj de Trumbe.

Per forta penego Trumbe sukcesis liberiĝi el la preno. Li deskuis siajn persekutantojn. Ankoraŭ kun la pantalone malsupre li stariĝis. Li tiris ĝin supren kaj rapide kaj senvorte ekkuris al la vilaĝo, sed liajn plorsingultojn oni daŭre aŭdis.

— La alko fuĝis, ridis Gunnar. Ni provos per la kaptofoso la ventontan fojon.

Ankaŭ la aliaj ridis dum kiam ili vidis Trumbe kuranta al la vilaĝo. Poste la kvar silentiĝis. Ili reiris al la luda arbostumpo kaj lasis siajn armilojn tie.

— Supozeble vi ne kredis, ke mi permesos al sklavo ludi per armiloj, diris Arne. Mi obeas al la leĝo. Tion vi ja scias.

Poste ili nenion diris, sed silentaj reiris al la vilaĝo, sed interne de si Arne havis strangan senton. Estis ia doloro interne en la brusto, kvazaŭ li, kaj ne Trumbe, estus trafita de la lanco sur la dorso. Kion diros Trumbe la venontan fojon, kiam ni renkontos lin? pensis Arne. Li devus kompreni, ke estas diferenco inter liberulo kaj sklavo. Ja ne povas sklavo ludi per armiloj.

Tio, kio doloris interne en Arne, ne ĉesis. Ĝi daŭre doloris. Li kaj Trumbe konatiĝis antaŭ tri-kvar jaroj. Patro Björn aĉetis Trumbe de kelkaj komercistoj, kiuj trapasis. Li estos sklavo en la bieno. Ankoraŭ li estis malgranda, sed kiam li estos granda li estos sklavo, kiu bone servos. Iam estis sufiĉe amuze ludi kun Trumbe, sed oni ne povis ŝerci kun Trumbe kaj amuziĝi same kiel kun Gunnar. Krom tio Trumbe estis sklavo, ne amiko.

Arne silente pluiris al la vilaĝo kune kun la aliaj, sed tio kion ili faris al Trumbe ankoraŭ doloris en Arne. Li hontis.

Leif Nordenstorm

Insulanoj de Hemsö

El la kvina ĉapitro

Kaj baldaŭ komenciĝis preparado por la geedziĝo, kiu daŭros dum tri tagoj. Oni buĉis porkon kaj bovinon; aĉetis ducent stofojn da brando, marinis haringojn en salo kaj laŭrofolioj; bakis, frotlavis, faris bieron, boligis, fritis kaj muelis kafon. Dum ĉio ĉi Gusten montradis misteran mienon. Li lasis aliajn decidi kaj eldiris neniun opinion. Dume Carlsson plejparte sidis antaŭ la komoda klapo, skribante kaj kalkulante; faris vojaĝojn al Dalarö kaj aranĝis ĉion necesan.

Alvenis la tago antaŭ la geedziĝo, kaj Gusten frumatene pakis sian sakon kaj ekiris. Lia patrino vekigis kaj demandis, kien li iros. Gusten respondis, ke li intencas iri por rigardi, ĉu la strandfiŝoj jam alvenis, kaj jen li estis for.

Ĉe la bordo li jam antaŭe pretigis sian boaton kun manĝoprovizo por pluraj tagoj kaj kunportis litkovrilon, kafokaserolon kaj aliajn necesajojn por restado surŝere. Li tuj hisis velon, kaj anstataŭ iri en la golfon, por esplori ĉu melanotoj jam alvenis ĉe la varmaj malprofundaj bordoj kun sabla fundo, por strande baniĝi, kiel oni nomadis tion, li direktis sin rekte eksteren inter la ŝerojn.

Nun en la fino de julio la mateno estis blindige serena, la ĉielo estis blublanka kiel sengrasigita lakto, kaj insuloj, insuletoj, ŝeroj, rokoj, ŝtonoj kuŝis tiel mole solvigante en la akvo, ke ne eblis determini, ĉu ili apartenas al tero aŭ ĉielo. Sur la internaj insuloj, plej proksime al la ĉeftero, staris piceoj kaj alnoj, kaj ĉe la terpintoj kuŝis merĝoj grandaj kaj mezgrandaj, maranasoj kaj mevoj; pli fore de la ĉeftero videblis nur vente torditaj pinoj; kaj urioj, aŭkoj, nigraj kaj papagsimilaj, sentime naĝadis ĉirkaŭ la boato por misgvidi la ĉasiston foren de la nestoj kaŝitaj en rokaj fendoj; fine la ŝeroj estis pli malaltaj, pli kalvaj, kaj ĉi-fore vidiĝis nur unuopa pino lasita por porti nestujon, en kiu oni kutimis rabi ovojn de molanasoj kaj merĝoj, aŭ sorparbo, super kies frondaro nubo el kuljo ŝanceliĝis en la vento. Transe etendiĝis la brila maro, kie rabmevoj praktikis sian ŝtelĉasadon en milito kontraŭ ŝternoj, grizaj kaj arĝentaj mevoj, kaj kien maraglo de temp' al tempo direktis sian pezan, obtuzan flugadon, por eble kapti

kuŝantan molanason. Tien ĝis la lasta ŝero Gusten nun direktis sin, duonkuŝante ĉe la stirstango kaj kun pipo enbuŝe, trenata de varmeta suda brizo; kaj je la naŭa horo li surteriĝis sur Norsten. Ĝi estis roka insuleto de unu hektaro kun meza valetto. Nur kelkaj sorparboj staris nudaj inter la ŝtonoj; cetero kreskis en la rokaj fendoj pompa evonimo kun siaj fajroruĝaj beroj, kaj la valo estis kovrita de dika tapiŝo el erikoj, korvoberoj kaj marĉaj rubusoj, kiuj jam komenciĝis flave maturiĝi; disaj juniperoj kuŝis kvazaŭ plate tretitaj sur la roka grundo, ŝajne alkrucante sin per la ungoj por ne forbloviĝi. Jen Gusten estis kvazaŭ hejme; li konis ĉiun ŝtonon, sciis kie levi juniperan branĉon por trovi kovantan molanasinon, kiu permesis al li glatumi ŝian dorson, dum ŝi bekpinĉis al li la krurumon; jen li enigis sian forkopalon en rokan fendegon kaj eligis aŭkojn, kiujn li mortigis tordante la kolojn por havi kiel matenmanĝon. Ekstere estis la haringokaptejo de Hemsö, kaj ĉi tie la insulanoj kune kun alia grupo da fiŝistoj konstruis budon, en kiu ili kutimis tranokti. Tien Gusten nun direktis siajn paŝojn, prenis la ŝlosilon el ĝia kutima loko sub la tegmentorandoj kaj enportis siajn aĵojn. La budo konsistis nur el ĉambro senfenestra, kun kuŝbenkoj, brete aranĝitaj unu super la alia, forno, tablo kaj tripieda tabureto sur kiu sidi.

Stivinte siajn aferojn enbude, li grimpis surtegmenon, malfermis la kamentuban klapon kaj reiris suben. Poste li prenis la alumetojn de ilia loko sub trabo, ekbruligis en la forno, kie la lasta vizitinto ne forgesis la malnovan kutimon enmeti iom da brulligno por siaj postsekvantoj. Li metis poton da terpomoj sur la fajron, kovris la terpomojn per tavolo da peklitaj fiŝoj kaj ekbruligis pipon atendante. Manĝinte kaj trinkinte, li prenis la fusilon kaj iris ĝis la boato, kie li havis la logbirdojn. Li remis eksteren kaj ankris ilin apud terpinto, poste li enrampis en la kabanon aŭ pafkaŝejon konstruitan el ŝtonoj kaj branĉetoj. Liaj logbirdoj balanciĝadis sur la longaj marondoj, kiuj rompiĝis ĉe borde, sed neniuj molanasoj ŝajnis surakviĝi. La atendado iĝis longa, kaj li enuis; rondiradis inter la bordaj ŝtonoj gvatante pri lutro, sed trovis nur nigrajn vipeojn kaj vespuojn inter lumantaj salikarioj kaj sekaj brosaventoj.

Tamen li ŝajnis ne tre zorgi ĉu li ion ricevas aŭ ne, sed movis sin ĉefe por moviĝi, por eviti resti hejme aŭ ĉar plaĉis al li vagadi ĉi-fore, kie neniu lin vidis kaj neniu lin aŭdis.

Post la tagmanĝo li kuŝiĝis en la budo por dormi, kaj je la vespermanĝa tempo li remis kun morua fadeno por provi sian bonŝancon en tiu rilato. La maro nun estis senmove sternita, kaj li vidis la teron etendiĝi en ora strato de la subiranta suno kvazaŭ maldensaj fumo. Ĉirkaŭ li estis silente kiel en senventa nokto, kaj li aŭdis batadon de remilingoj en distanco de duona mejlo. Fokoj baniĝis en respekto plena malproksimo, suprenigis siajn rondajn kapojn, blekis, blovis kaj replongiĝis.

La moruoj vere estis kaptiĝemaj, kaj li sukcesis elakvigi kelkajn blankventrulojn, kiuj per siaj faŭkoj grandaj sed sendanĝeraj oscedis pri akvo kaj grimacis al la suno, kiam ili haŭliĝis supren el sia profunda mallumo kaj svingiĝis trans la boatrandon.

Li restadis ĉe la norda flanko de la ŝero, sed kiam rapide vesperiĝis kaj li turnis sin al la tero, li unue rimarkis, ke fumas el la kamentubo de la budo. Scivolante kio okazis, li direktis sin per rapidaj paŝoj supren al la dometo.

"Ĉu jen vi?" li aŭdis de interne, rekonante la voĉon de la pastro.

"Ho, ĉu estas vi, sinjoro pastro!" Gusten surpriziĝis, vidante la pastron sidi ĉe la fornaj ardoj fritante haringojn. "Kaj ĉu vi venis sola ĉi-loken?"

"Jes, mi iris por serĉi moruojn kaj restadis ĉe la suda flanko, tiel ke mi ne vidis vin. Sed kial vi ne estas hejme preparante la morgaŭan geedziĝon?"

"Nu, vidu, mi ne partoprenos en tiu geedziĝo", diris Gusten.

"Ej, kia babilo, kial vi ne partoprenus?"

Gusten laŭ kapablo klarigis siajn motivojn, el kiuj aperis unue ke li volas foresti de evento, kiun li abomenas, kaj due ke li volas per tio 'stampi' tiun, kiu malutilis al li.

"Nu bone, sed ĉu vi pensis pri via patrino?" kontraŭis la pastro, "ĉu vi ne bedaŭras, se vi hontigos ŝin?"

"Mi ne povas pensi tiel", respondis Gusten. "Mi pli bedaŭras min, kiu havos tian aĉulon kiel vicpatron kaj ne povos akiri la bienon, dum li restos tie."

"Nu, komprenu, mia knabo, tion ne eblas ŝanĝi, kvankam eble oni

povos pli malfrue ion fari, sed nun morgaŭ matene vi prenu la boaton por hejmeniri. En la geedziĝo vi devos esti!"

"Nu, vidu, sendube tio ne okazos, ĉar mi jam unufoje decidis la aferon", Gusten certigis.

La pastro lasis la temon kaj ekmanĝis siajn haringojn ĉe la forno-plato. "Ĉu vi eble ne havas drinkon, knabo?" li ekparolis. "Komprenu, mia edzino havas la kutimon enŝlosi ĉiun fortaĵon, kaj tiel frue matene mi ne povis akiri ion."

Jes; Gusten ja havis brandon, kaj la pastro ricevis sufiĉan kvanton, tiel ke li iĝis parolema kaj babilis tien-reen pri la parohaj aferoj, eksteraj same kiel internaj. Kaj sidante sur ŝtonoj ekster la budo ili vidis la sunon subiri kaj la krepuskon kuŝiĝi kiel melonkolora nebulo sur ŝeroj kaj akvo. La mevoj enlitiĝis sur fuka benko, kaj la kornikoj ekiris en la mezan insularon por serĉi noktejon en la arbaroj.

Estis tempo enlitiĝi, kaj necesis forpeli la kulojn el la budo, por kiu celo oni fermis la pordon kaj plenigis la dometon per fumo de Nigra Anko, post kio oni remalfermis la pordon kaj plenumis la ĉason per soppobranĉetoj. Kaj poste la du fiŝistoj demetis la paltojn kaj grimpis supren ĉiu sur sian kuŝbenkon.

"Nun vi bonvolu doni al mi drinkon kontraŭ la pedikoj", almozpatis la pastro, kiu jam antaŭe ricevis kelkajn grandajn, kaj sur la litorando Gusten donis al li la lastan sanktoleadon, post kio oni devis dormi.

Estis mallume en la budo, nur kelkaj strioj da taglumo trarompis la likantajn murojn, kaj en la avara lumo kuloj trovis sian vojon al la dormemuloj, kiuj tordadis sin kaj ĵetadis sin tien-reen en siaj kestoj por eskapi de la turmentantoj.

"Ho, estas tute diable!" fine ĝemis la pastro. "Ĉu vi dormas, Gusten?"

"Certe, certe! Ĉu iu povus dormi ĉi tie ĉi-nokte? Sed kion do eblas fari?"

"Ni devas ellitiĝi por denove fari fajron, mi vidas neniu alian eblon. Se ni almenaŭ havus ludkartojn, ni povus ludi dekuon; ĉu vi eble kunhavas kartaron?"

"Ne, mi ne havas, sed mi pensas scii, kie la viroj el Kvarnöarne havas la sian", Gusten respondis kaj paŝis suben el la lito, rampis sur la tera grundo sub la lastan kuŝbenkon kaj elvenis kun kartaro iom uzita.

La pastro jam ekbruligis fajron, surmetis juniperajn branĉetojn sur la fornon kaj eklumigis kandelpacon. Gusten surfajrigis la kafokaserolon kaj eltiris haringobarelon, kiun ili metis inter la genuojn kiel ludotablon. Kaj jen ili ekbruligis siajn pipojn; baldaŭ la kartoj dancadis kaj la horoj pasis.

"Tri freŝajn, rezignon, atuton", aŭdiĝis, alterne kun unu-du sakroj, kiam kulo senaverte almetis sian ku-

pon sur la nukojn kaj fingroartikojn de la ludantoj.

"Aŭskultu, Gusten", la pastro fine interrompis, ŝajne direktinte siajn pensojn aliloken ol al kartoj kaj kuloj. "Ĉu vi ne povus sapumi al li la okulojn alie, sen foresti de la geedziĝo? Aspektus malkuraĝe cedi al tia diabla brutto, kaj se vi volas ĉagreni lin, mi havas pli bonan konsilon."

"Nu, kiel do tio okazus?" demandis Gusten, kiu ja trovis domaĝe malhavi la festenan regalajojn, kiu tamen estos prenita de lia patra heredaĵo.

"Revenu hejmen posttagmeze tuj post la ceremonio, dirante ke vi estis retenita surmare. Tio povos esti sufiĉa ĉikano, kaj poste ni kune ebrigos lin tiel ke li ne venos en la geedzan linton. Tiel ni aranĝos, ke la knaboj mokados lin. Ĉu tio ne povus sufiĉi?"

Gusten ŝajnis ne malema, kaj li moliĝis imagante tritagan restadon sola sur la ŝero, dumnokte manĝata de kuloj, des pli ĉar li efektive sopiregis kunesti por gustumi ĉiujn delectaĵojn, kiujn li vidis prepariĝi. Tial la pastro proponis planon por plenumi la aventuron, kaj akceptis ĝin Gusten, kiu kunlaboros pri ĝia efektivigado. Kontentaj pri si mem kaj unu pri la alia ili do fine enlitiĝis, kiam taglumo enrompis tra la pordaj fendoj kaj la kuloj laciĝis de sia nokta dancado.

**August Strindberg: Insulanoj de Hemsö (Hemsöborna, 1887)
Traduko: Sten Johansson**

Glosaro:

argenta mevo ^{ORE EDK EV JLG} *Larus argentatus*, grizblanka granda mevo
aŭko ^{PV} *Alca torda*, mara birdo nigra-blanka nestanta are sur marbordaj rokoj
brosaveno *Avena strigosa* Schreb., specio de aveno
granda merĝo ^{ORE EDK} *Mergus merganser*, naĝbirdo
griza mevo ^{ORE EDK EV} *Larus canus*, grizblanka flavkrura mevo
haŭli ^{PV} Tiri al si per ŝnuro
korvobero ^{WP EDK} (= nigra empetro ^{PV}) *Empetrum nigrum* L., nigra bero
maraglo ^{PV} *Haliaeetus*, genro de agloj vivantaj ĉemare
maranaso ^{EV NPIV ORE} *Melanitta*, nigra naĝbirdo
marĉa rubuso ^{EDK EV JLG} *Rubus chamaemorus* L., arbusto kun flava bero kreskanta sur malseka tero
melanoto ^{EV JLG PN} *Leuciscus idus*, fiŝo el ciprinedoj
mezgranda merĝo ^{ORE EDK EV} *Mergus serrator*, naĝbirdo
molanaso ^f *Somateria mollissima*, granda anaso ĉasata pro la lanugoj
rabmevo ^{PV} *Stercorarius*, marborda birdo kun miaŭa bleko, kaptas mevidojn

stofa ^f 1,3 litroj
ŝero ^{PV z} pli-malpli nuda insuleto
urio ^{PV} *Uria aalge*, nigra-blanka marbirdo nestanta are sur rokaj bretoj
vic-patro ^{JCW} nova edzo de patrino

^{EDK} Erich-Dieter Krause: Grosses Wörterbuch Esperanto-Deutsch, 1999

^{EV} Ebbe Vilborg: Ordbok Svenska-Esperanto, 1992

^f Fundamenta

^{JCW} John C. Wells: Concise Esperanto and English Dictionary, 1968

^{JLG} Sam Owen Jansson, Fritz Lindén, Birger Gerdman: Svensk-esperantisk ordbok, 1934

^{ORE} Ornitologia Rondo esperantlingva: Komunlingva nomaro de eŭropaj birdoj, 1971

^{PV} Plena Ilustrita Vortaro, 1981 kaj 2002

^{PN} Paul Nylén: Esperanto-Sveda Vortaro, 1933

^{WP} Wouter Pilger: Provizora Privata Listo de komunlingvaj nomoj de plantoj de nord-okc. Eŭropo, 1982

^z Zamenhofa

KANTO

Ĉiu momento estas vojaĝo

Moment'
subite nin frapas sent'
malkonstanta estas ĉia ent'
kaj ĉia memoro

Post nin
la nun' enkutimigis sin
komencos akompanas fin'
amardolĉa sonor

Vojaĝ'
ĉu ploras vi pro la pasinta paĝ'
ĉu la moment' floras en via vizaĝ'
kaj via koro

Muziko: Tomas Q Nilsson kaj Niclas Malmberg

Teksto: Tomas Q Nilsson (Tomio)
Esperantigo: Torun Jansson kaj Astrid Jansson

ento: abstraktaĵo, rigardata kiel reala ekzistaĵo

Edipo. Radio-monologo

PAROLANTO

Estimataj aŭskultantoj! Tiu, kiu sidas tie, ĉe la fenestro, estas Edipo, reĝo en Tebo. Ni ĉiuj konas la historion pri Edipo. Kiel li, nesciante pri tio, kion li faras, mortigis ĉe kampara vojo sian patron, Lajon, la tiama reĝo en Tebo. Kiel li poste edziĝis kun sia patrino, Jokasto, la vidvino de Lajo, kaj mem fariĝis reĝo en Tebo. Kiel li savis la urbon de la afliktoj de la Sfinkso kaj prosperigis Tebo dum la sekvantaj dekkvin jaroj dum li dividis feliĉan geedzan vivon kun Jokasto kaj la kvar infanoj, kiujn ŝi naskis de li. Ni scias, ke tiam, kiam la vero pri Edipo kaj Jokasto riveligis, Jokasto pendumis sin, kaj Edipo, per pinglo de broĉo de ŝia robo, elŝiris la proprajn okulojn. De tiam Edipo pasigis la ceteron de la vivo kiel senhejma vaganto, blinda almozulo petante panon de preterpasantoj.

Jes, karaj, ni jam scias pri tio. Ni jam scias, ke io tia atendas Edipon ĉirkaŭ la angulo. Sed en la momento Edipo mem ne scias tion. Li ne kapablas ĉirkaŭrigardi angulojn. Baldaŭ, post semajno, eble post tago, Edipo lernos, ke la pasinteco ne estas nur bildoj en la memoro sed terura pugno, kiu atendas la momenton batĉi, pugno, kiu batadas, ĝis ĝi mortigas.

Guste nun Edipo estas laca. La okuloj doloras. Li sidas en sia ĉambro fronte al aperta balkona pordo, tra kiu la sunbrilego enfluas de la mondo ekstera. La rebrilo de la blanka polvo sur kontraŭa montoflanko atakas la okulojn kvazaŭ per la tuta forto de la suno. Blindiga montoflanko de blanka polvo longe for de la maro, kaj super tio, lazura ĉielo. Ankaŭ tion oni ne povas longe rigardi.

Edipo ripozigas la okulojn je la ŝtona planko ĝuste apud sia piedo. Li rigardas la porozan surfacon, kaj linion inter du ŝtonblokoj. Li rigardas la piedon kaj ĝian striktan sandalon. La sandalo, li nun konstatas, akiris fendeton je la rando. Ŝtono sur la vojo, evidente.

Li levas la rigardon al la flanko de la pordo. Vidas murajn ŝtonblokojn, unu super la alia. Li diras al si mem, ke tiuj ne falos. Li direktas la rigardon el la ĉambro al la mondo ekstera, mondo, kiu pro la forto de la sunbrilo estas preskaŭ nealrigardebla.

Aferoj ne iras glate por Edipo. Tiu plago, aŭ pesto, kiel ajn oni nomu ĝin, jam faris grandan impreson sur la

popolo. La greno putriĝas sur la kampoj. La Suba Mondo pleniĝas je animoj de Tebanoj. Civitanoj amasiĝas ekster la palaco. Li mem dividas iliajn suferojn. Iliaj vivoj okupas lin pli ol la propra. Li jam agis senprokraste, kiel kutime. Li komisiis Kreonon, frato de Jokasto, iri al Delfo por peti helpon de la Orakolo de Apolono. Edipo atendas la revenon de Kreono. Tuj kiam Edipo posedas la faktojn, li agos. Ĝis tiam estas nenio por fari . . . Kompreneble oni ne povas forpeli tian problemon tute el la menso. Tia problemo tro gravas. Ne estas nura administra detalo . . . tamen, sen scii la faktojn oni nenion atingos per senĉesa cerbumado.

En la silento de la ĉambro Edipo ekkonsciĝas pri sia spirado. Pri la leviĝo kaj falo de la brusto. Pri la aero eniranta kaj eliranta la korpon. De longa distanco atingas lin la frapetaĵo de masonista martelo. La sono iel kunfandiĝas kun la blindiga lumo, kiu inundas la balkonon. Li duonfermas la okulojn kontraŭ la brilego, por ke li pli bone vidu detalojn en la sceno ekstere.

Li vidas ĉareton, kiun iu lasis stari ĉe la enireja pordego. Ĉareton konstruitan el grizroza ligno kaj krude riparita. Ĝi portas brunkoloran makulon, kiu similas la formon de virbovo. Li vidas malordan amason de bastonetoj, kiujn ju forĵetis apud muro. Li vidas la pordon de gardistejo, rimarkinte nigrajn fendojn inter la kvin tabuloj. Vidas momento-daŭran ĉielarkon en la akvo, kiun iu elĵetas tra fenestro-truo.

Edipo ripozigas la piedon sur tabureto kaj fermas la okulojn. Li sentas doloron en la piedoj. De la infanaĝo difekto ĉe ambaŭ piedoj, kies kaŭzon li ne sukcesis malkovri, estas al li konstanta handikapo. Dum la jaroj la doloro malkreskis, sed neniam tute forlasis lin . . . Li pensas pri Korinto, vidas sin kiel infano. Lia patro Polibuso faris ekskurson por alrigardi la metistojn ĉe la masonistejo. Edipo denove vidas antaŭ si grundon kovritan de ruĝaj, bluj, kremkoloraj marmorpecetoj. Li vidas duonformitajn marmorajojn ringformajn bazojn de kolonoj. Vidas sin promenanta man-en-mane kun Polibuso inter krudaj marmorblokoj pli altaj ol Polibuso mem. Vidas la brilantan vizaĝon de Polibuso dum li trapasas ombbron. Li vidas sin prenanta ŝtoneton, kiu iel

similas homan piedon. Ĝi briletas rozkoloro kontraŭ la bruno de la mano.

La Fato. Ne eblas sondi ĝin. Ekzemple, kiu povintus antaŭvidi, ke Edipo estas tiu, kiu venkos la Sfinkson? Fari tion postulis kuraĝon, memfidon. Kaj eble iom da aroganteco, trajto, kiun Edipo hodiaŭ ne tiel ofte publike montras. Ne temis simple pri ambicio. Temis pri energio. Kaj la volo.

Sed pri tiu ĉi pesto. Fonto de maltrankvilo, kiun oni devos pritrakti decideme, depende de la informo, kiun Kreono ricevos de la Orakolo. Decideme, same kiel Edipo pritraktis la Orakolon de Apolono, kiam ĝi prognozis malbonon pri Edipo. Li devis fuĝi de Korinto, neniam plu vidi la patron, la patrino. Tio ne estis facila. Ne ĉiu kapablus tion.

Edipo malfermas la okulojn kaj ankoraŭfoje preskaŭ blindiĝis pro la necedema brilego de la roka montoflanko. Jes, io en la vivo estas necedema. Unu evento post la alia, ĉeno de okazaĵoj sen ia eltrovebla interrilato. Kaj nun la afero pri la pesto.

Edipo elrigardas super la polvokirlaĵoj en la palaca korto, korto ruĝa kaj flava, parte pavimita, parte nuda grundo. Post la korto li vidas malgrandajn kampojn malregule lokitajn laŭlonge de la montopiedo. Super sur la montoflanko du figuroj malsupreniras, sed tiel longe for, ke sole per tre akuta vidpovo oni kapablas vidi ilin. Edipo posedas tre akutan vidpovon. Li vidas hundon, kiu zigzagas trans la spuroj de la figuroj. Kaj objekto, kiun unu portas, sur kiu la sunlumo speguligas.

Edipo strebas reteni en la vido la du figurojn kaj la hundon. La rebrilo de la montoflanko tiel fortas, ke ĉiuj tri ŝajne malaperas en ĝin. Ili sekvas konatan vojon. Ĝi iras trans la monton, al Korinto . . .

Edipo rememoras pri loko, kie tri vojoj kuniĝas . . . ĉaro tirita de ĉevaloj . . . heroldo rajdanta antaŭe . . . pasaĝero, grizhara . . . samstatura kiel Edipo mem . . .

Edipo scias, ke io atendas lin ĉirkaŭ la angulo. Li scias ankaŭ ke dum la Orakolo informas pri tio, kio okazos, ĝi ne informas kiamaniere oni traktu ĝin. Oni devas fari tion senkonsile. Ekzemple, tiu aŭguro de la Apolona Orakolo pri lia patro Polibuso, ke Polibuso destinata esti mortigita de propra filo. Tio ne realiĝis ĉar

Edipo fuĝis, por ke li neniam plu vidu Polibuson. Li mem malpravigis la aŭguron. Kaj vidu . . . de tiam, ĉio iris bone por li. Unue, lia edziĝo kun Jokasto post la morto de la reĝo, Lajo. Ŝlosila evento en lia vivo. Jokasto havas dudek jarojn pli ol Edipo, sed montriĝis tuj, ke tio estas grandega avantaĝo por li. Ŝia reputacio en Tebo kaj ŝia sperto pri regado de la urbo ebligis ĉion al li. De tiam ĉio iris bone. La kontoj balanciĝas. La publikaj vojoj estas riparitaj. Kvereloj inter civitanoj estas solvitaj kontentige. La popolo restas kontenta . . .

Ombro de akcipitro malrapide transiras la blankan polvon. Transiras mizeran arbuston. Transiras fosajojn kaj rokojn piede de la monto . . . Akcipitro kapablas vidi muson de alto pli granda ol tiu de la plej alta konstruaĵo. Edipo ofte rigardas tiujn birdojn. Kapabli vidi tiel klare . . . de tiel longe for! Sed neniu kapablas vidi ĉion. Verŝajne eĉ ne la dioj. La ombro de la akcipitro transiras la rokan montoflankon. Transiras ravineton kaj forlasitan domon. Transiras rivereton, kaj muron konstruitan el kremkolora tonio.

Jes, tiel estas. Oni devas fidi sole je tiuj aferoj, kiujn oni mem ne kapablas ŝanĝi. Tiamaniere aperos speco de ordo en la fluo de eventoj. Fluoj, kiu alie estus nura kaoso. Jes, oni pripensas aferon, prenas ion koneblan en la konsideron, faras decidon, agas . . . kaj la rezulto ne multe diferencas de nura hazardo. Kontraŭ la dioj, la racieco ne venkos.

Edipo apogas sin kontraŭ la muro. Malmola, malvarma tono. Li alrigardas la blindigan montoflankon. Li vidas la du figurojn malsuprenirantajn kun la hundo . . .

En la memoro bildiĝas mallarĝa monta interkrutejo . . . ĉaro, kies pasaĝero rifuzas cedi lokon al li . . . maldigna bataleto . . . la ĉaro renversita, la grizhara pasaĝero mortinta . . . Jes, por estri la vivon oni devas preti malpurigi ne nur la manojn, sed la brakojn ĝis la kubutoj.

Tiu pesto certe havas kaŭzon. Supozeble eblos malkovri la kaŭzon kaj forpeli ĝin. Konfesinde oni ne povas sondi ĉion pri la vivo ĝis la lasta detaleta . . . ĉiun eventon, ĉiun okazaĵon . . .

Tamen se temas pri la bonfaro de la civitanoj oni devas fari sian eblon. Ekzemple, tiu afero pri la Sŝinkso, kiu dum jaroj plagis la urbon per siaj enigmoj. Edipo malkovris la kaŭzon de tio kaj forigis ĝin. Okazos same pri tiu pesto. Kreono baldaŭ revenos de la Orakolo kun definitivaj informoj, informoj kiujn oni publike pridiskutos. Nenio restos kaŝita.

Edipo ankoraŭ konsciiĝas pri la martelado de la masonistoj. Oni konstruas elfluilon por la rivereto, kiu elrokiĝas ĉe la vojkurbo. La urbo bezonas tion. Edipo image vidas akvon

en sunbrilo elfluantan laŭ glata, verda marmoro. Akvon, kiu ankoraŭ ne varmiĝis pro la suno. Akvon el profundaĵoj en la monto. Akvon, kiu jam fluadis tra subteraj kavernoj, akvofaloj, abismoj, jaron post jaro ĉiam antaŭpelita al la lumo . . . Multaj aferoj en la vivo estas bonaj . . . suno, oro, sukceso . . . sed la plej bona el ĉiuj estas akvo.


Post la rando de la balkono Edipo vidas tegmenton. La tegmenton de la domo de Tirezio. Edipo rememoras pri manrelo ĉe la muro en la korto tie. Relo fiksita tiel, ke Tirezio povas pripalpi la vojon al la strato sen kolizii kun tonbenko. Oni diras, ke Tirezio, sen okuloj kapablas vidi pli ol iu alia . . . Tirezio devos esti konsultita, kiam revenos Kreono. Edipo jam atentigas Tirezian. Tirezio sendube estas saĝulo, scias multon . . . sed en la fino oni bezonas ion definitivajn, ion pli solidan ol divenojn, ol supozoj. Tiu pesto signifas ion. Ĝi ne aperis hazarde el nenio. Faktojn oni bezonas.

Edipo scias, ke post la pesto aperos io alia. Kaj post tio denove io alia. Ĝis fine, Edipo mem, ankaŭ li trovos lokon en la Suba Mondo kiel ombro inter ombroj, kun siaj dolorantaj piedoj. Sed en la homa mondo oni memoros lin, kiel tiun, kiu savis Tebon de la afliktoj de la Sŝinkso kaj regis la urbon en trankvilo. Kun tia renomo li povas resti kontenta.

Edipo vidas en la distanco fumstrion super la laborejo de la potistoj. Ekbrulas en la forno. Li fermas la okulojn kaj atendas ĝis laodoro de brulanta ligno atingos lin tra la trembrila aero.

FINO

Harold Brown



El la libro "Eduko danĝera" de Harold Brown.

RAKONTO

Memoro de verda sunradio

Ĉu ekzistas verda sunradio? Jes, ĝi estas natura fenomeno, kiam nur dum iu momento la suno ekbrilas per verda lumo! La plimulto travivas sian vivon kaj neniam ĝin vidas. Sed mi kredas, ke en Svedio ĉe marbordo eblas vidi tiun fenomenon proksimume samofte kiel en mia patrujo Latvio sur la okcidenta marbordo de Kurlando.

Se esence kaj kurte priskribi la aperon de verda sunradio: Ĝi estas aŭ la unua lumradio, kiam la matena suno levigas ĉe la horizonto, aŭ la lasta lumradio, kiam la suno subiras malantaŭ la horizonto. Eblas ĝin vidi nur sur ebenaĵo (kutime sur maro aŭ ĉe marbordo), se nenio kovras la horizonton. La fenomeno aperas pro la disperso de sunluma spektro kaj la refrakto de lumradioj, se la atmosfero estas tre pura. La daŭro de "la verda lumradio" estas dum 0,5 ĝis 3 sekundoj.

La unuan fojon mi ekvidis la veran verdan lumradion kiam mi estis eta knabo — nur 7-jara. Kun mia avo ni staris vespere sur strando en vilaĝo Pavilosta kaj rigardis "kiel la suneto dronas en maron". Kaj, jen, la marakvo, la blanka plaĝa sablo kaj ŝajnis ke — la tuta mondo ĉirkaŭe ekverdiĝis per milda, softa, sed verdbrila lumo. Ja fakte tiu lumo kaj ankaŭ la propra memsento ne estas priskribebla! Mi certe ektimis, kaptis la manon de avo kaj demandis: Kio estas "tio", kaj li, kiu estis persono vere religiema, kviete respondis:

"Nepo, vi vidis iomete da Paradizo".

. . . Ofte mi ŝatas promenadi sur la strando serĉante sukcenpecetojn kaj je sunsubiro rigardante laŭ la verda lumradio, sed la sukcenpecoj estas maloftaj kaj la fabela verdbrileco — tro rara . . .

Elmar Virkavs,
Liepaja, Latvio

Esperanto-Centro — kvar eller inte?

Under senare år har Esperantoförbundets revisorer gång på gång påpekat att medlemsavgifterna inte räcker till för att både ge ut medlemstidningen *La Espero* och betala hyran för förbundets kontor, *Esperanto-Centro* i Stockholm. Det var riktiga påpekanden och styrelsen har också gjort vad den kunnat för att hålla kostnaderna nere. *La Espero* kostar nu mindre att producera än för några år sedan, men hyran är det svårare att göra något åt. Senast i våras krävde revisorerna att vi skulle säga upp hyreskontraktet.

Faktum är, att medlemsavgifterna aldrig eller nästan aldrig räckt till för att täcka Esperantoförbundets kostnader. Förbundet har under hela sin nästan 100-åriga historia varit beroende av medlemmarnas extrabidrag för sin verksamhet. Tittar man genom äldre årgångar av *La Espero*, hittar man ständiga uppmaningar att bidra till särskilda projekt, tack till olika bidragsgivare och information om testamenterade medel. Det är mycket tack vare dessa extramedel som Esperantoförbundet kunnat hålla igång i 100 år.

Situationen inte unik

Situationen just nu är alltså inte unik. Det som gör den något besvärligare är det minskade antalet betalande medlemmar. Äldre medlemmar, med försämrade privatekonomi, finner årsavgiften 200 kronor betungande, yngre medlemmar har vant sig vid att "allt ska vara gratis", vilket tycks gälla på internet, som blivit deras referensvärld.

Styrelsen har tagit på allvar revisorernas krav, att vi måste göra något åt hyreskostnaden. De undersökningar som Ulla Luin åtagit sig att göra under våren — att hitta billigare alternativ — har dock visat, att den hyran vi betalar för Esperanto-Centro är mycket låg och att nästan varje annat alternativ, utom att helt säga upp hyreskontraktet, blir dyrare.

Vi har försökt tänka oss olika lösningar, från den allra enklaste — en postbox och en mobiltelefon — till den nuvarande lösningen med ett fungerande kontor i landets huvudstad. Vi kan åstadkomma en besparing, ekonomiskt, men samtidigt en organisatorisk försvagning, som skulle leda till en nedåtgående spiral.

Esperantorörelsens ansikte utåt

Esperanto-Centro i Stockholm är svenska esperantorörelsens ansikte utåt och dess verksamhet riktar sig till hela landet. Det är ett ställe som man kan inbjuda till, med ständigt aktuell information, en "mässmonter" som fungerar året om.

Det finns en förening i Stockholm, som använder sig av kontoret för sina möten. Föreningen skulle kunna sammanträda någon annanstans. Genom att förlägga sina möten till *Esperanto-Centro* och betala för det, bidrar föreningen i viss mån till hyran.

En arbetsgrupp, bestående av *Anita Bergh*, *Kaisa Hansen* och *Ulla Luin*, har fått styrelsens uppdrag att utreda hela frågan med *Esperanto-Centro* och komma med förslag före augusti månadens utgång. I sina undersökningar har gruppen utgått från att vi behåller *Esperanto-Centro* i Stockholm. Det finns nämligen medlemmar, som tycker att vi ska ha kvar ett kontor i Stockholm. Många av dessa tycker detta så starkt, att de är villiga att bidra ekonomiskt till det. Arbetsgruppen föreslår dessutom en upprustning av *Esperanto-Centro*, så att det blir attraktivt att förlägga fler slags verksamheter dit.

I ramen här till höger hittar du en uppmaning att vara en av dem som "tar sig an" *Esperanto-Centro*. Det är bara genom att tänka expansivt, som vi kan hjälpas åt att vända den nedåtgående spiralen uppåt. Att lägga ner, att "anpassa verksamheten till skorna", som någon uttryckt det, skulle vara liktydigt med att passivt tyna bort.

Och det vill vi inte, inte ens förbundets revisorer.

Franko Luin

PS. Vill du vara en av dem som "tar sig an"? Tala om det för någon av dessa: Anita Bergh, tel. 08 — 590 858 72, Kaisa Hansen, tel. 08 — 590 882 10, Ulla Luin, tel. 08 — 712 82 91.

Esperanto-Centro värt att besöka

Esperanto-Centro — Vårt ansikte utåt

Vi är många som tycker att Esperanto-Centro behövs. Det är vårt ansikte utåt och alltid väl värt ett besök. Vi är många som tycker så, därför har vi, Anita Bergh, Kaisa Hansen och Ulla Luin, fått styrelsens godkännande att skapa projektet "*Esperanto-Centro — Vårt att besöka!*"

- **Vi har tagit oss an** att skapa ett rymligare Esperanto-Centro med möjlighet att hålla information, kurser och konferenser på hög nivå och med hög kvalitet.
- **Vi har tagit oss an** att arrangera så att Esperanto-Centro kommer att ha regelbundna öppettider och att det då finns esperantister där som kan ge kvalificerad information.
- **Vi har tagit oss an** att via Rondo Langlet, skapa en stabil inkomst för SEF så att kostnaderna för Esperanto-Centro inte tär på möjligheterna att arrangera andra aktiviteter som t ex att delta i Skollmässan. **Kom med i Rondo Langlet Du också!**
- **Vi har tagit oss an** att se till att skyltfönstret under hela året ska ge en aktuell och informativ bild av Esperanto till huvudstadens invånare och besökare.
- **Vi har tagit oss an** att söka externa bidrag för att rusta upp lokalen så att ovanstående och mycket mer ska bli möjligt på Esperanto-Centro.

Med andra ord — **Esperanto-Centro är värt att besöka!**

Stöd vårt projekt du också! Bli medlem i Rondo Langlet!

Anita Bergh,
Kaisa Hansen
och Ulla Luin